



5*88.128.

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



pasporta servo

listo de gastigantoj de TEJO



En Budapeŝto aperis nova adresaro "PASPORTA SERVO". Ĝi enhavas 900 adresojn de gastigantoj el 58 landoj de la mondo. Tiuj homoj ofertas al vi senpagan tranoktadon en siaj hejmoj. Kondiĉoj estas jenaj:

- Esperanto-lingvokono
- plenumo de la kondiĉoj de la gastiganto
- posedo de la adresaro "PASPORTA SERVO"

La adresaro kostas 40 Kčs kaj estas akceptebla ĉe la landa organizanto. Skribu al Jiří Kreuzberger, 747 56 Dolní Životice 157 (telefono hejmen (653) 93514, laboreja (653) 98181).

Se vi havas eblecon, fariĝu gastiganto de la Pasporta servo. Aligilojn kaj detalajn informojn vi ricevos sur la sama adreso.

70 JAROJ DE LA MEMSTARA ĈEĤOSLOVAKIO

La 28-an de oktobro rememoras nia popolo ĉiujare kiel signifan tagon de nia respubliko. Tiutage en la jaro 1918 estis deklarita memstara Ĉeĥoslovaka respubliko. Ĉeĥoslovaka respubliko ekestis kiel memstara libera ŝtato sur parto de iama teritorio de Austria-hungaria monarkio. Tiu okazintaĵo tre grave influis ĉiujn sferojn de la vivo de nia popolo.

La ĉeĥaj landoj estis parto de Habsburgida monarkio fakte preskaŭ 400 jarojn. El la historia vidpunkto sidis sur la ĉeĥa trono Habsburgidoj jam kelkfoje. La unua, Rudolf Habsburg, regis niajn landojn jam en la jaroj 1306-1307, t.e. tuj post la pereco de ĉeĥdevena dinastio de Premysl-idoj, sed ekde la jaro 1526 regis ĉeĥajn landojn la Habsburgida dinastio kontinue ĝis la jaro 1918. Ĉeĥaj nobelaroj kelkfoje ribelis kontraŭ la politiko de Habsburgidoj, sed la venko de imperiestro Ferdinand la II-a la 8-an de novembro 1620 en la batalo sur Bílá Hora (Blanka Monto, hodiaŭa kvartalo de Prago) signifis finon de la memstareco de ĉeĥaj landoj. Ferdinand la II-a kiel averto al la popolo ekzekutigis en la jaro 1621 dudek sep ĉeĥajn nobelojn kaj urbanojn. Sian senfinan potencon li deklaris en la jaro 1627 per t.n. "Renovigita Landarango", aro da leĝoj, kiuj certigis absolutan potencon de la reganto, deklaris katolikan religion kiel la unusolan ŝtate permesitan religion en la lando kaj t.n. egalrajtan staton de la germana lingvo en ĉeĥaj landoj.

Tiu ago signifis ĉiufankan subpremon de nia popolo. Malgraŭ ke la germana kaj la ĉeĥa lingvoj estis lau tiu leĝaro egalrajtaj, la germana baldau fariĝis la sola oficiala lingvo. Pro la neakcepteblaj kondiĉoj de la nova leĝaro devis sian patrujon forlasi multaj eminentaj personecoj. Inter ili estas la plej konata J. A. Komenský (Komenio). Sur la ĉeĥa teritorio senlime furiozis jezuitoj, kiuj persiste neniiĝis ĉion ĉeĥan. Estis forbruligataj ĉeĥaj libroj, estis ekstermataj homoj, kiuj aliĝis al nekatolikaj religioj. Tiuj malfavoraj kondiĉoj regis preskaŭ ĝis la fino de la XVIII-a jarcento. Tiam en la jaroj 1780-1790 reganta imperiestro Josef la II-a per kelkaj reformoj establigis religion liberon, sed per siaj lerneĵaj reformoj li deklaris la germanan kiel unusolan instrulingvon en ĉeĥaj lernejoj. Do en niaj lernejoj oni instruis germanlingve. En la jaro 1784 estis ankau en la universitato la latina anstataŭigita per la germana!

Feliĉe, aliaj reformoj de la imperiestro liberigis servutulojn kaj ebligis liberan migradon de la loĝantaro, do la pura ĉeĥa lingvo komencis iom post iom penetri en germanizitajn urbojn. Malgraŭ fortaj nacirenesancaj tendencoj kaj senlaca laboro de multaj ĉeĥaj eminentuloj la ĉeĥa ne estis agnoskita kiel oficiala lingvo en ĉeĥaj landoj ĝis la fina falo de la monarkio.

Ekzemple ni povas mencii, ke ekde la jaro 1867 estis permesitaj ĉeĥlingvaj telegramoj. Sed ili estis akceptataj kiel telegramoj "fremdlingvaj" kaj ili devis komenci per germana indiko, pri kiu "fremda" lingvo temas. Kaj kruelaj punoj pro la uzo de la ĉeĥa en la armeo regis fakte ĝis la fino de la unua mondmilito.

La deklaron de la memstara Ĉeĥoslovaka respubliko, kiu okazis la 28-an de oktobro 1918, ni povas pritaksi el multaj vidpunktoj. Tre gravaj estas ĉefe aspektoj politikaj, socialaj, ekonomiaj ktp. Por ni, esperantistoj, estas tamen grava la vidpunkto kulturpolitika. Jen koncerniĝas pri la liberigo de nia lingvo kaj nia kultura vivo, kiuj estis fakte 300 jarojn subpremataj. Nur post la disfalo de la monarĥio kaj ekesto de la memstara ŝtato de ĉeĥoj kaj slovakoj ni povis plene utiligi la fruktojn de nia pli ol miljara kultura tradicio.

-jk-

Lingva noto de la redakcio.

En la supra artikolo kelkfoje troviĝas la esprimo "ĉeĥaj landoj", per kio ni komprenas landojn Bohemio, Moravio kaj la ĉeĥan parton de Silezio. Ili kune formas Ĉeĥlandon, Ĉeĥion, kiu kun Slovakio formas Ĉeĥoslovakion. En la ĉeĥa lingvo ne estas kutimo nomi la ĉeĥan landon singulare "ĉeĥlando", sed plurale "ĉeĥaj landoj". Bedaŭrinde tiun ĉi ĉefismon oni praktikas ankaŭ en Esperanto, pro tio la ofta kaj neĝusta "ĉeĥaj landoj".

● NI LEGIS ●



Konferencio de ĉeĥa sekcio


En karbo- kaj ŝtalprodukta regiono en urbo Kladno la 21-an de novembro kunsidis pacaktivuloj por trakti sian laboron dum la pasinta agadperiodo. La Konferenco de Ĉeĥa MEM-sekcio partoprenis 37 delegitoj el 18 Esperanto-kluboj. Ankaŭ partoprenis kiel gastoj Cermáková el Distrikta paca konsilantaro kaj s-ino Jana Peštuková el Urba konsilantaro. La konferencon solene malfermis artistino Eva Seemannová per deklamo de poemoj "Ni kantas kanton de la paco" de Vítězslav Nezval kaj "Paco" de Vidman. Ĉefan raporton faris prezidanto de ĉeĥa MEM-sekcio Drahomír Kočvara. Li alte taksis la pacajn kunsidojn en Pardubice, jam tradiciajn pacmarŝadojn en Jablonec nad Nisou, Ležáky kaj aliaj. Post raporto de pacamiko Kočvara diskutis 14 delegitoj el Esperanto-kluboj pri sia paca laboro. La delegitoj estis detale informitaj pri 11-a Ĝenerala Konferenco de MEM en Budapeŝto. Drahomír Kočvara kaj inĝ. Margit Turková estis elektitaj kiel delegitoj por la konferenco en Budapeŝto.

Posttagmeze forveturis ĉiuj delegitoj al Lidice, kie oni metis florbukedon al la monumento Lidice. Artistino Eva Seemannová ĉi tie deklamis poemon "Lidice". Prezidanto Kočvara tralegis projektorezolucion, kiun aprobis ĉiuj partoprenantoj.

Jen teksto de la Rezolucio de la Konferenco de Ĉeĥa MEM-sekcio, kiu okazis en Kladno la 21-an de novembro 1987.

"La partoprenantoj instigas ĉiujn esperantistojn per la Internacia Lingvo Esperanto mobilizi ĉiujn fortojn cele al subteno de la paco, kiu estas minacata. Ni postulas, ke en politikajn kaj internaciajn rilatojn estu enkondukita nova pensado, kaj miskompreno inter ŝtatoj estu solvataj per agoj.

(fino sur pĝ. 9)



Konferenco en Budapeŝto

La 11-a Ĝenerala Konferenco de la Mondpaca Esperanto-Movado okazis en Budapeŝto ekde la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1988-a jaro. La solenan inauguron de la konferenco partoprenis reprezentanto de la hungara pac-movado, reprezentantoj de UEA s-ino F. Szabó - Felső kaj D-ro O. Haszpra, prezidanto de MEM kaj membro de la Monda Pac-Konsilio D-ro Imre Pethes, ĝenerala sekretario de MEM C. Tholet kaj ĉefredaktoro de Paco Violin Oljanov. La konferencon partoprenis du centoj da geesperantistoj el 19 landoj.

La prezidanto de MEM D-ro Pethes prezentis Ĝadprogramon de MEM, el kiu ni elektis la taskojn de MEM:

"La nuntempa espereble evoluanta mondsituacio postulas multflankan aktivadon por paco, interkompreniĝo kaj paca kunekzistado. La taskoj ne estas simplaj, sed solveblaj, se la homoj kaj movadoj komune kunagadas, kion jam montras la nunaj antaŭenpaŝoj en la interkonsento.

1. Organizaj laboroj.

MEM-aktivuloj

- partoprenu ĉiun forumon por helpi la konkretigon de la celoj de la pacmovado kaj iniciatu ankaŭ Esperantistajn aranĝojn konigante la taskojn de la pacmovado kaj MEM,
- subtenu la organizadon de pacmanifestacioj,
- organizu esperantistajn pacrenkontiĝojn, plurlandajn amikajn kunvenojn, aliĝu al neesperantistaj renkontiĝoj kaj kunvenoj kaj ankaŭ tie parolu pri la plej aktualaj pactemoj, celoj kaj rezultoj de la pacmovado,
- organizu renkontiĝojn, kunvenojn de MEM-aktivuloj kaj interesiĝantoj de MEM lige kun la Universalaj Esperantistaj Kongresoj, landaj Esperanto-Kongresoj, aliaj aranĝoj kaj pritraktu la aktualajn porpacajn kaj organizajn aferojn,
- plivastigu la nombron kaj simpatiantojn de MEM je la intereso de realigo de la movadaj celoj,
- utiligante ankaŭ siajn kontaktojn, agadu pri fondaĵoj de novaj MEM-sekcioj, perantoj kaj abonantoj de "PACO",
- per siaj ĉiuj eblecoj /intersaĝo, korespondado, amikeco, kunlaboro ktp./ instigu ĉiun Esperanto-grupon, klubon organizi packunvenon,
- plibonigu siajn agadojn, laŭ la Statuto de MEM.

2. Agitado kaj propaganda laboro.

MEM-aktivuloj

- pere de siaj kontaktoj publikigu informojn pri la taskoj kaj fari-taj laboroj, agadoj de MEM en Esperantaj kaj neesperantaj gazetoj, revuoj, tiucele aranĝu dissendojn per Radio kaj Televido,
- urĝigu sian atenton kaj reagon por la plej aktualaj pactemoj,
- pliperfektigu siajn agitadmetodojn per disponigoj de konvenaj propagandiloj,
- subtenu la universalan, aktivan pacmovadon pere de la internacia lingvo,

- helpu la informadon al la publiko pri la aktivado de MEM per eldonado de plurlingvaj informiloj,
- regule helpu la redaktoran laboron de "PACO" kun taŭgaj artikoloj kaj informoj pri la agado de porpaca movado, ĝenerale kaj speciale pri MEM,
- pli efike utiligu la eblecojn de "La Pacaktivulo" por informado pri la eventoj okazintaj en la pacbatalo kaj pri la movadaj aferoj, pri organizaĵoj,
- kontribuu por multigi la abonantojn kaj legantojn de "PACO", donu informon pri ĝi en ĉiu forumo kaj amikeca rondo,
- ekkaptu kaj utiligu la elstarajn jubileojn, okazintaĵojn, ŝtatajn kaj popolajn festojn, manifestaciojn por aktualaj pacaj celoj kaj speciale esperantista kaj MEM-agadoj.
- La redaktoroj de "PACO" kaj "La Pacaktivulo" publikigu artikolojn taŭgajn por sukcesi la propagandon pri la aktualaj demandoj de la pacmovado kaj MEM-agado kaj certigu eblecon por efektiviĝi dialogon inter la legantoj konekse de la aperigitaj artikoloj.

3. Plifortigu la kontaktojn, kunlaborojn kun

- Monda Packonsilio laŭ la aprobita kunlabora kontrakto inter MEM kaj MPK, helpante ties agadon kaj evoluadon,
- Ĉiuj pacmovadoj efektivigante utilan dialogon kaj helpante ilian agadon,
- Universala Esperanto-Asocio, helpante la efektivigon de kontrakto inter UEA kaj MEM kaj la evoluadon de la internacia esperantista movado,
- naciaj, landaj kaj internaciaj organizaĵoj, asocioj, movadoj agantaj en la pacmovado,
- Ĉiuj organizaĵoj, kies agado servas la pacon kaj la interhoman amikiĝon, ĉefe kies agado rilatas al MEM,
- junularaj organizaĵoj, ĉefe kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo /TEJO/ certigante la partoprenon de la junularo en la esperantista pacmovado kaj certigu novajn aktivulojn por MEM el inter la junularoj,
- mondscale konataj personoj, ŝtatestroj, funkciuloj de ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, sindikatoj, movadoj, kiuj ankaŭ mem strebas efektigivi la daŭran pacon kaj celojn de MEM.

...La rezervo de paco nuntempe pli forte ol en la antaŭaj tempoj ankaŭ en pli grandaj mezuroj tenas necesa:

- fortigon de la agadvolulo unu kun alia,
- plimultigon de la konfido reciproke,
- la evoluigon de la homaj kontaktoj, utiligi al tio la ĉiam pli disvastiĝantaj eblecoj de la "popolturismo",
- efektivigon de la kontaktoj inter la etkolektivoj kaj familioj,
- la elformigon de la frataŭrbaj kontaktoj,
- igi la pacmovadon al pensanta movado.

La agadprogramo de MEM enhavas nur la plej gravajn taskojn, farotaĵojn, sed espereble donas al la movadanoj helpon por koncentrigi siajn agadojn al tio. Ĝi kalkulas ankaŭ kun la utilaj iniciatoj kaj memstaraj opinioj de movadanoj de MEM.

La efektivigo de la agadprogramo bezonas komunan, seriozan, konsekvencaŭspigon, partoprenon, kunagadon, kunlaboron de ĉiuj movadanoj. Ĝi konsistigas konkretan kunlaboron al la plifortigo kaj defendo de la paco!"

LITERATURA SEKCIO



Miroslav Malovec

K I O N N I T R A D U K U ?

Sabate kaj dimanĉe, la 19-an kaj 20-an de marto 1988, okazis en Roudnice nad Labem kunveno de la literatura sekcio de ĈEA por tradiskuti la perspektivan planon de tradukado el la ĉeĥa lingvo en Esperanton. Partoprenis ĝin dek personoj /T. Kristofová, Z. Podmeľová, ing. M. Turková, E. Urbanová, K. Janouš, J. Karen, J. Laube, M. Malovec, J. Patera kaj J. Rumler/. Siajn kontribuojn sendis skribe J. Cink. La diskuton gvidis J. Karen.

Temis precipe pri kvar demandoj:

- kiujn verkojn kaj aŭtorojn tradukadi
- kiel la tradukojn eldoni
- kiamaniere edukadi novajn tradukantojn
- stilaĵ problemoj de tradukado.

La sekcio preferas esperantigon de la modernaj vivantaj aŭtoroj, ĉar eblas kunlaborigi la verkiston kun lia tradukanto, tiamaniere altiri al la movado prestiĝajn personojn de nia nacia kulturo kaj samtempe konvinke pruvi la utilecon de Esperanto por disvastigado de novaĵ literaturaĵ juveloj tra la mondo.

La modernaj verkoj havas ankaŭ pli grandan ŝancon esti eldonataj en la ŝtataj fremdlingvaj eldonejoj apud la tradukoj en mondlingvojn, ĉar tiuj eldonejoj dediĉas sin preskau senescepte al la propagando de la nuntempa literaturo. Kompreneble, la kvaliton de la tradukoj devus garantiĝi membroj de la asocio de ĉeĥaj tradukistoj, kiuj profesie tradukas ankaŭ en aliajn lingvojn kaj havas altlernejan lingvistikan kaj literaturan edukitecon. Tiuj profesiaj tradukistoj povas metodologie gvidi laboron de amatoraj tradukantoj, finredakti iliajn tradukojn kaj tiamaniere gardi la bezonatan kvaliton. Kiam la sekcio havos en la manoj plurajn altnivelajn esperantigojn de aktualaj verkoj, ĝi povos komenci la traktadon kun la koncernaj institucioj. Ŝajnas reale sukcesi unue pri Esperanto-versio de almanako el la ĉeĥa literaturo, kiu ĉiujare aperas en pluraj lingvoj, ne vekante tro grandan intereson en eksterlando. Espereble la reagoj de esperantistoj estus pli potencaj kaj pli spontanaj. Krome la sekcio planas prepari reprezentan ĉeĥan antologion similan al la slovaka, sed el la modernaj verkistoj /Hrabal, Páral, Pludek, Šýs, Žáček kaj centoj da aliaj aŭtoroj/.

Por tradukemuloj la sekcio planas prepari kurson similan al la kurso terminologia de ing. Werner. Jam nun la sekcio deziras ligi kontaktojn kun esperantistoj, kiuj provas traduki ian beletraĵon, ĉu modernan, ĉu klasikan, ĉu ili kontentas aŭ malkontentas pri la rezultoj de sia strebado. Aliĝu al la adreso de Miroslav Malovec /Charkovská 7/10, 625 00 Brno/ kaj skribu, kion vi tradukas aŭ jam tradukis. Grupo da kunlaborantaĵ interesitoj pri tradukado povas pli efike altigi sian lingvoscion kaj traduklertecon ol izolulo, al kiu mankas kritikantoj, konsilantoj kaj ebloj de eldonado.

Eĉ tre talentaj stilistoj povas produkti fuŝajn tradukojn, se mankas al ili klara koncepto pri tradukarta teorio. Ekzemple multaj ne konscias, ke la Parnasa gvidlibro respegulas la situacion en la klasika poezio, dum la moderna poezio kun libera verso kaj sen eliziado de la o-finaĵo jam postulas tute aliajn kreaĵn procedojn. Simile kiel en la naciaj kulturoj ankau en Esperanto-poezio ekzistas tri gravaj epokoj: la epoko de poeziaj pioniroj /Zamenhof, Grabowski/, la epoko de alproprigado de la mondliteraturaj klasikaĵoj /Kalocsay, Waringhien/ kaj la epoko de la moderna poezio /Auld/. La dua epoko estas bonege teorie klarigita en la Parnasa gvidlibro, sed la tria epoko siajn teoriistojn ankoraŭ atendas.

La beletra lingvaĵo sendube bezonas esti riĉa kaj esprimiva, por ke ĝi kapablu interpreti ne nur tradukatajn sencojn kun ĉiuj nuancoj, sed ankau imiti la individuan stilon de la unuopaj aŭtoroj. Simile kiel eĉ laiko scias rekoĝi pentraĵojn de Rembrandt, Goya, Reĝoir au van Gogh, simile ankau grandajn verkistojn eblas rekonii laŭ ilia stilo. Kompreneble, neniu verkisto deziras, ke lia originaleco forviŝiĝu en la tradukoj, ke liaj verkoj estu tradukataj per la sama lingvaĵo kiel la verkoj de kolegoj, tiom malpli kiel gazetaj artikoloj au administraciaj proklamoj. Tial beletra bezonas multajn sinonimojn, verajn skalojn da esprimoj /superba, splenda, bela, ĉarma, linda, eleganta, plaĉa, plumpa, punca, turpa, hida, abomena, monstra/, el kiuj la stilistoj povas elekti la plej taŭgajn por konkreta situacio kaj celo. Tia lingvo "abunda kaj redunda" ebligas esprimigi trafe, koncize kaj precize, kompakte kaj originale. Sopi-ro pri tia lingvo vekas ĉe verkistoj emon riĉigadi la internacian lingvon per neologismoj /riĉigadi, ne reformadi!/, sed ofte ili e- lektas malĝustajn metodojn, forgesante, ke ĉiu novaĵo bezonas certan tempon por akceptiĝi en la socio uzanta la lingvon. Superŝutado de lingvo per novismoj grave bremsas enkondukadon de vere utilaj es- pri- moj kaj kondukas al individuaj dialektoj, kiujn la publiko ne kom- prenas.

Kunlabore kun la scienc-teknika sekcio la literatura sekcio preparos fundamentan vortaron de literaturaj terminoj, kiu estos proponita al Terminologia Esperanto-Centro por plua prilaboro.

La kolekto de referaĵoj el la kunveno estas pruntebla ĉe la li- teratura sekcio de CEA.

Ankoraŭ vivas multaj olomoŭcanoj, kiuj memoras sian ŝatatan instruiston Albin Neužil, kvankam jam pasis en februaro 1988 kvar- dek jaroj de lia morto. Kiel vilaĝa instruisto li esperantiĝis 1904 kaj tuj komencis instrui Esperanton al siaj ĝelernantoj. Kiam li farigis direktoro de elementa lernejo en Olomouc-Neředín, ĉiu lia lernanto havis sur la lerneĵatesto ankau klasifikon el nedeviga Es- peranto. Sed krom infanoj dum sia tuta vivo li instruis milojn da plenkreskuloj. En la jaroj antau kaj post la dua mondmilito li es- tis por plimulto da loĝantaro de Olomouc konata persono pro sia senlaca propagando de la internacia lingvo kaj por multaj la nomo Neužil egalas al Esperanto. Li havis specialan instrumentodon kaj al- venadis eĉ eksterlandanoj por lerni ĝin. Li estis certe la plej me- ritplena Esperanto-instruisto de Olomouc, longjara funkciulo de Es- peranto-movado, ankau prezidanto de Esperanto-klubo en Olomouc. Al- li verdire apartenis la nomigo je honora prezidanto de la Esperanto- klubo en Olomouc en jaro 1946. (Vlastimil Blažek)

Pedagogia sekcio

La VI-a metodologia seminario en Strážnice

Sudmoravia urbeto Strážnice estas konata ne nur pro siaj riĉaj folkloraj tradicioj kaj bona vino. En tiu ĉi urbeto travivis siajn knabajn jarojn neniu malpli grava ol Jan Amos Komenský, do Komenio, instruisto de nacioj. Inter la 19-a kaj 24-a de aprilo 1988 li fa- rigis spirita patrono de pedagogia kunveno, kiun partoprenis kvar- deko da Esperanto-instruistoj el ses landoj. Sub auspicioj de ILEI, reprezentita per la sekretario Marin Bacev, la komisiitoj por IMS-oj Zsuzsa Barcsay kaj Till Dahlenburg kaj la organizinto de antaŭaj du IMS-oj Irena Szanser. La enkonduka prelego de Zsuzsa Barcsay resumis la problemaron de la antaŭaj seminarioj, okazintaj en Pollando, Hun- gario kaj Bulgario. Realigo de la sesa IMS en Ĉeĥoslovakio donis al ĉefaj Esperanto-instruistoj bonan eblecon renkonti siajn eksterlan- dajn gekolegojn kaj pridiskuti kun ili siajn ideojn kaj spertojn. La ĉeftemo "Evoluigo de la kvar komunikkapabloj" estis pritraktata dum tri prelegtagoj en 19 prelegoj /du lautlegiĝis pro neĉeesto de pre- legantoj/:

1. Dan Maxwell: Du kvinlandaj eksperimentoj /raporto pri pedagogi- aj eksperimentoj en instruado de Esperanto kaj fremdaj lingvoj/
2. Till Dahlenburg: Interligo inter ĝenerala klerigado kaj Esperan- to-instruado
3. Achim Zettier: Pri la rolo de la lernpsikologio por efika in- struado
4. Márta Kovács /lautlegita/: Testoj serve al la evoluigo de la re- ceptivaj kapabloj
5. Stano Marček: Audvida Esperanto-kurso por progresintoj /prakti- ka monro helpe de lumbildoj kaj sonkasedo/
6. Josef Vojáček: Modernaj instrumentadoj kaj ilia aplikado en la lingvoinstruado
7. Ilona Koutny: Komputilo - kontribuo al la evoluigo de skribo kaj audio /kun praktika ekzemplo de parolsintezo/
8. Katalin Kisfaludy: Enkonduka komputila Esperanto-kurso /Bĝda- rinde, pro manko de bezonata komputilo, la aŭtoro- no ne povis praktike montri sian programon/
9. Miloš Bloudek: Esperanto en komputilaj programoj /Praktikaj ek- zemploj/
10. Irena Szanser: Psikologiaj kaj lingvistikaj konceptoj influantaj la metodologion de fremdlingva instruado
11. Pavla Jodasová: Principoj de informiva instruado
12. Linhard Rýznar: Rektmetoda instruado kaj ĝiaj instruhelpiloj
13. Stefan MacGill: Al parola lerto per la komuniksituaĵa aliro
14. Jan Repa: Klubo de internacia amikeco /Propraj spertoj kaj kon- kludoj/
15. Miroslav Malovec: Problemoj de skribaj kursoj /Analizo de plej oftaj eraroj de lernantoj/
16. Magda Šaturová: Bazaj leksikologiaj principoj de dulingvaj vor- taroj
17. Ivanka Spasova: Ekzercoj en Esperanto-instruado por progresantoj /kun praktikaj ekzemploj/



1



2



3



4



5



6

1. Zsuzsa Barcsay aprezas la antaŭajn seminariojn
2. Prelego de D. Maxwell - ĉe la tablo sidas reprezentantoj de naciaj pedagogiaj sekcioj, de maldekstre: I. Szanser, Pollando, Z. Barcsay, Hungario, I. Spasova, Bulgario, T. Dahlenburg, GDR, V. Barandovská, CSSR
3. Prelegas Till Dahlenburg, komisiito de ILEI por metodikaj seminarioj
4. Jan Řepa parolas pri la junularaj kluboj, surbendigas J. Filip por la magnetofona servo de CEA
5. Ing. Bloudek prezentas sian komputoran instruprogramon
6. La seminarianoj antaŭ la statuo de Komenio

18. Cao Donghai /laŭtleĝita/: Komparado kaj induktado de gramatikaĵoj por progresintoj
19. Václav Horčíčka: Esperanto en lernejoj /konsideroj/

Prelegoj 6 kaj 13 estos publikigitaj en "Starto", plejparto de aliaj /1, 2, 3, 4, 7, 10, 12, 16 kaj parte pliaj/ estis surbendigitaj kaj do disponeblaj ĉe magnetofona servo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Krom la prelegoj oni havis okazon babili pri Somera Esperanto-Tendaro en Lančov kaj pri pasinta Universala kongreso de UEA en Varsovio - la programon kun diapozitivaj preparis Pavla Jodasová kaj Jan Pavlík. Dum ekskursaj tagoj oni vizitis interesan muzeon de folkloro arĥitekturo - skanzenon en Strážnice, kastelon en Milotice kaj barokajn vinkelojn en Petrov, al la amuzprogramo apartenis prezentado de folkloro grupo Lipina kaj ĝia kordcimbala muzikista grupo el Vracov.

ILEI-respondeculoj kaj organizinto de la sesa IMS kunsidis fine de seminario por konkludi, komenti kaj rekomendi pluan laboron. Oni konstatis, ke la instruado de Esperanto bezonas rilati, kiel cetero la lingvoinstruado ĝenerale, ankau al la eduka flanko de instruprocezo mem. Kiel ĉeftemon de la venonta IMS oni do proponis: "Lingvopedagogiaj aspektoj de Esperanto-instruado" /specife ekzemple: lingvaj komparoj, lingvaj scioj, plivastigo de ĝenerala klereco/. Estis proponite, ke la sekvonta, VII-a IMS okazu en Slovakio, en aprilo 1989. La organizantoj de la VI-a seminario komisiis la respondeculon pri pedagogiaj aferoj en centra komitato de CEA, ke li prezentu tiun ĉi proponon al la reprezentantoj de Slovaka Esperanto-Asocio. Tiel, espereble, la kunlaboro de Esperanto-instruistoj el diversaj landoj plu kreskos kaj kvalitiĝos.

En la nomo de pedagogia sekcio de CEA mi kore dankas al ĉiuj prelegintoj, kiuj prezentis interesan kaj bezonan materialon. Laŭdo kaj danko apartenu ankau al ĉiuj, kiuj ofereme helpis dum organiza laboro, nome František Havlík, organizinto de kultura kaj ekskursaj programoj, Vladislav Hasala, kiu kunorganizis loĝadon kaj manĝadon, instalas varbekspozicieton en seminariejo /hotelo Cerný orel/ kaj Jiřina Vondráková, kiu helpis kun ekonomiaj aferoj kaj funkciigis libroservon, kaj ĉiuj aliaj. La partoprenintoj de la sesa metodika seminario estis kontentaj kaj ili certe ĝojatendas la venontjaran sepan en Slovakio.

V. K. Barandovská, prezidantino
de pedagogia sekcio

(fino de pĝ. 2)

Ni postulas, ke estu respektata homrajto de vivo en paco. Ni estas kontraŭ militarigo de kosmo.

Ni voĉdonas por malpermeso de atomaj eksplodoj kaj kontraŭ produktado de nukleaj armiloj.

Ni ĉiam uzados Esperanton por defendo de la tutmonda paco."

Ĉiuj delegitoj forveturis kun la espero, ke neniam plu ripetiĝos sortoj de Lidice, Ležáký, Hiroŝima kaj aliaj lokoj, kie la milito postlasis sange subskribitan vizitkarton.

Ludvík CHYTIL
en LA PACAKTIVULO 150/1988

Elementa kurso en PRAGO



En la lernojaro 1987/1988 sukcese finis la vesperan kurson en Prago ĉe kursestro Ing. Ludvík Veselý jenaj gekursanoj:

Borkovec František, Zvolenská 3128/6, Praha 4
 Hubnová Zdenka, Zahradničkova 1121, Praha 5
 RNDr Kammerská Zuzana, Bulharská 44, Praha 10
 Kovářová Marta, Mládežnická 3061, Praha 10
 Kožešníková Miluše, Zvolenská 3128/6, Praha 4
 Matějka Jiří, Na sklonku 1, Praha 5
 Píková Martina, Donovalská 1660, Praha 4
 Sládková Jana, Erbenova 1, Praha 5
 Šouček Dalibor, Gramsciho 307/77, Praha 10
 Svarná Otilie, Hradecká 20, Praha 3
 Dr. Weigová Stanislava, Na Poříčí 8, Praha 1
 Zikmundová Zdenka, Olštýnská 607, Praha 8

Al ĉiuj ni kore gratulas!

Pri internacia korespondado

La internacia korespondado estas ĉe esperantistoj normala afero. Grava afero ankaŭ estas, kiel skribi la leterojn kaj kiel ili aspektu. Precipe por eksterlandano estas ricevita letero dokumento pri la skribinto, kiu estas por li reprezentanto de fremda lando.

Nur en ekonomiaj lernejoj oni instruas - eĉ en tri lingvoj - kiel skribi negocajn leterojn. Multo el tio validas ankaŭ por leteroj privataj, ĉar letero ja estas vizitkarto de la sendinto.

Tial ne skribu leteron sur papero, kies unu paĝo estas jam skribuzita por alia celo /eĉ tian "leteron" mi ricevis de altlerneja diplomito/. Ankaŭ ne estas konvene, uzi folion el kajero elŝiritan kaj ne nur simple liniitan, sed kvadratan. Atestas pri manko de belgusto, fari ion tian kaj krome, lasi lanugon ĉe la deŝirita flanko de la folio. Eĉ tiel iuj miaj plumamikoj skribis al mi. Oni ja povas aĉeti leterpaperojn en kompletoj po 10 pecoj kun kovertoj, sed ankaŭ po 100 pecoj, formato A 4. Reprezentaĵi personecoj presigas sur la paperojn artajn desegnaĵojn, kiuj prezentas ordinare iliajn ŝataĵojn.

Skribu - se ne bele - de absolute legeble, precipe se vi skribas al nacio, kiu en sia gepatra lingvo ne uzas la latinan alfabeton kaj tial ne konas diversajn deformaĵojn, en nia skribo eblajn, kaj eble ankaŭ ne konas sufiĉe bone Esperanton. Mi ĉiam klopodis, ke mia skribo estu legebla, ĝis kiam japanino skribis al mi, ke ŝi bezonas horojn, por decifri mian manskribon. Tial mia nomo fariĝis Isanura.

Skribante la tekston, atentu, ke la linioj de via skribo ne direktigu jen supren, jen malsupren, jen ondoforme. Tial prefere aĉetu presitan liniitan folion kaj submetu ĝin. Lasu liberajn marginojn ĉe ambaŭ flankoj de la letero. En la nuna teknikizita tempo estas neniu peko kontraŭ bontono, tajpi eĉ privatajn leterojn.

Vian nomon kaj adreson skribu ĉiam preslitere. Niaj poŝtaj reguloj postulas, ke estu skribita adreso de sendinto sur ĉiu sendaĵo eksterlanden. Se la adresato povas esti netrovebla, vi havas pli grandan probablecon, ricevi la leteron kaj ekscii pri tiu fakto, eĉ se tio daŭros duonjaron, ekz. el Brazilo, kie vi sendis la leteron aerpoŝte.

En la letero ne trastreku skribitaĵon kaj ne uzu frotgumon, neniam skribu per ordinara grafita krajono. Se vi ne estas sufiĉe lerta en verkado de Esperantaj leteroj, oferu la tempon kaj unue skribu malneton.

Skribu eksterlanden ĉiam kun la penso, ke vi reprezentas la patrujon. Povas okazi, ke via eksterlanda amiko, precipe iu el "okcidento", prezentas malĝustan opinion aŭ eĉ mokas pri io, kio ĉe ni okazis. La "okcidentaj" amaskomunikiloj, iam "ankaŭ-socialistaj", travestigas duonverojn eĉ mensogojn pri la socialismaj landoj. Tial vi devas kompetente korekti tiajn eventualajn misinformojn.

La leteron komencu ĉiam per alparolo, post kiu oni skribas komon. Skribi voksignon estas malnovaĵo. Ekzemple ĉo: Estimata sinjor/in/o, Kara semidean/in/o, Kara amik/in/o, ktp.

Esprimu ĉojn aŭ kontenton, se via plumamiko venkis ian mal-facilaĵon aŭ malagrablaĵon, gratulu al li pro ia sukceso, agrabla familia okazintaĵo ks., esprimu /ne deziru/ kondolencan, se mortis iu al li proksima. Se vi ricevis tiasecan esprimon, gratulon pro naskiĝaĵo, Internacia Virina Tago ks., ne forgesu danki. Se li menciis malsanon - ĉu sian ĉu de iu en la familio- esprimu esperon, ke li/ŝi jam intertempe resaniĝis.

Laŭ bontono ekzistas 14 taga tempolimo por respondi leteron, kalkulante ekde la tago de ricevo. Kontraŭ tiu postulo oni tre ofte pekas en la internacia korespondado.

En via letero vidas vin via amik/in/o kiel vi vin mem en spegu-

lo.

Adolf Stanura

ni mencias...

Universitato de La Laguna, Hispanio, aperigis preskaŭ 800-paĝan imponan libron honore al Juan Régulo Pérez "Senta Gratvlatória in honorem Juan Régulo", duan volumon dediĉitan al esperantismo. En la verko troviĝas artikoloj de sesdeko da renomaj Esperanto-verkistoj kaj fakuloj, kiuj per siaj tekstoj kontribuis al la honoro de D-ro Juan Régulo pro lia 70-jariĝo. Inter la kontribuintoj ni trovas ankaŭ nomojn de niaj s-anoj Jiří Kořínek, Vlastimil Novobilský kaj Josef Rumler.

La eseo de nia poeto Jiří Kořínek havas titolon "Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka" kaj la aŭtoro en ĝi pristudas la Esperantan poezion, prozon kaj dramverkojn originalajn kaj tradukitajn. Li skribas: "Ni konstatas, ke la lingvo vivas kaj evoluas kaj progresas en sia literaturo, kiu estas ĝia trezorejo kaj pulsanta arterio. Ĉiu kiu volas la lingvon perfekte regi devas legi. Legi kaj paroli! Nur poste verki. Legi ne nur gazetojn, sed ankaŭ librojn, prozon kaj poezion. Nur kiam ni tralegis dekojn da bonaj libroj, ni plene penetras en la spiritan de nia lingvo. Ĉar ellerni ĝisfunde kaj perfekte la ŝatatan lingvon postulas sindediĉon, laboron, malpigron. Tio tamen estas multe pli valora kaj grava ol la nura varbado por la lingvo, kiam oni mem restas daŭre nekonvinkanta balbutanta komencanto!"

La kontribuado de Vlastimil Novobilský havas titolon "Kontribuo de ĉeĥaj verkistoj al la Esperanta literaturo". Ĝi estas fakte konciza, nur 11-paĝa, sed tamen tre kompleta prezento de la ĉeĥa Esperanto-literaturo (tradukoj el la ĉeĥa literaturo, originalaĵoj de ĉeĥaj Esperanto-verkistoj), iaspeca enciklopedia artikolo, kiu meritis ĉeĥan tradukon inform- kaj propagandecan. Jen por ekzemplo la informo pri Moraviaj Esperanto-pioniroj: "Gravan mejloŝtonon por la Esperanta literaturo en Ĉeĥoslovakio signifas traduka kaj eldona

aktivecoj de "Moraviaj Esperanto-Pioniroj" (MEP). MEP estis unuiĝo de tri viroj: Jaroslav Mastný (ŝufabrikisto, 1892-1958), Antonín Kudela (juĝa oficisto, 1870-1939) kaj Albín Neužil (instruisto, 1883-1948), kiuj sciis ne nur saĝe elekti kaj bone traduki elstarajn verkojn de la ĉeĥa literaturo en Esperanton, sed ankaŭ bone organizi vendadon de la presitaj libroj. En la tempoperiodo de 1921-1938 ili eldonis sume 14 titolojn kaj fariĝis tiel la plej fruktodona Esperanta eldonejo en la antaŭmilita Ĉeĥoslovakio. La libroj aperadis en bela tipografia arango. Ĉe la tradukado kaj teknikaj laboroj tre efektive kunagis Josef Řebíček (1875-1960) kaj Antonie (Tonča) Mrázková (1891-1942)."

La artikolo de Josef Rumler estas titolita "Koncepto pri la diversaj stiloj kaj ĝia apliko al la Esperanta leksiko" kaj ĝi estas fakte la teksto de la tre fama (ĉu ankaŭ konata?) eseo "Abunde kaj redunde", kiu aperis kiel literatura suplemento de la ĉs. numero de Paco en 1986-a jaro.

Ni povas esti fieraj, ke ankaŭ niaj verkistoj kontribuis al la omaĝlibro al profesoro D-ro Juan Régulo Pérez, "kiu per sia eldona aktiveco helpis interalie popularigi verkojn de ĉeĥaj aŭtoroj tra la mondo".

x X x

Omaĝe al la Centjariĝo de Esperanto kaj 65-jariĝo de Josef Rumler aperis en Prago en 1987 modestaspekta libro - fakte nur 32-paĝa kajero kun dulingva titolo: Josef Rumler - Ranní dojení - Matena melkado.

La poemo Ranní dojení aperis unuafoje jam post la dua mondmilito kaj nun ĝi estas nova eldono. Ĝi estas nekutima poemo - poemo sen verboj, sed tamen emociiga, plenkolora, vivoplena. Jen legu fragmenton pri la matena vekigo:

A tepla přispění
čehosí růžovění
a tepla třibení
a co v štětcích není
v tom tepla třibení
nové novotné barev proměnění
nebes i země rozsvícení
A kura zapění
hováď zabučení první zabučení
a toho člověka dělného člověka
ze sna navracení

La poemo glorigas la homon, lian laboron - sed ankaŭ la ĉeĥan lingvon, ties kapablojn kaj esprimriĉecon.

La paralela Esperanta versio ne estas traduko. Ĝi estas samvalora originalo, kiu nun aperis unuafoje. Jen legu kaj guu fragmenton el la Esperanta poemo:

Kaj de l' varmo kontribuo
ies roziĝo rozeiĝo
kaj plua de l' varmo fortiĝo kribriĝo transformiĝo
kaj kio eĉ per penaj penikoj ne plenumiĝos
tio efektiviĝos
dum ĉi de l' varmo densiĝo intensiĝo fortostreĉiĝo
jen nova novisma de la koloroj metamorfoziĝo
de la ĉieloj kaj de la tero luminiĝo

Kaj la koka ekkanto
de bruto ekmugo tirekmugado
kaj de l' homo la ulo laboremulo
el songo revenado

Ankaŭ pri la Esperanta versio ni povas diri, ke ĝi montras la kapablojn kaj riĉecon de Esperanto - kaj tiel glorigas ankaŭ ĝin. En la manoj de la poeto Esperanto fariĝas delikata esprimiva alt-kvalita ne artefarita, sed artnivela kulturlingvo.

La libreto estas inda omaĝo al Esperanto kaj laŭdediĉe al Juan Régulo Pérez.

x X x

Esperanto-normo

Fine de pasinta jaro aperis prese la unua Esperanto-normo kun nomo "normiga principaro TEC PRI 006350 ESPERANTO-NORMO, aranĝo, strukturo, aproba procedo". Laŭ la enkonduka komuniko oni distingas jenajn normajn dokumentojn: normigajn principarojn (signitajn TEC PRI), normajn terminarojn (TEC TER) kaj normigajn preskribojn (TEC PRE).

La "Esperanto-Normo" enhavas jenajn determinojn:

1. Ĉefaj principoj ĉe kreado de Esperanto-Normoj
2. Aranĝo de Esperanto-Normo
3. Strukturo de la terminaro
4. Aproba procedo por Esperanto-Normoj

Krome al ĝi apartenas kvar apendicoj: Modela paĝo de la terminaro; Modela Labora Folio; Modela Aproba Folio; Modela front-paĝo de norm-propono.

En "Aldono" oni prezentas koneksajn Esperanto-Normojn, kiuj estas prilaborataj:

TEC PRI 001110 DIFINOJ EN TEC-TERMINARO, optimumigo
TEC TER 001400 TERMINOLOGIO
TEC PRE 001815 ARANĜO DE REGISTROJ DE PUBLIKAĴOJ
TEC PRE 003034 TRANSLITERADO PER LA ESPERANTO-ALFABETO, PARTO 1, cirila skribo, la rusa
TEC PRE 003083 MALLONGIGOJ DE NORMOJ KAJ NORMIGAJ INSTITUCIOJ
TEC PRE 003350 NUMERADO DE TEC-DOKUMENTOJ
TEC PRE 003353 NUMERADO DE TEKSTOJ
TEC PRE 003620 SIMBOLOJ DE LINGVOJ
TEC PRI 006050 TERMINOLOGIA KAJ TERMINOGRAFIA PROCEDO
TEC TER 010000 INFORMAJ FONTOJ
TEC PRE 025450 UNIVERSALA DEKUMA KLASIFIKO, konciza eldono
TEC PRE 529100 INDIKADO DE DATOJ KAJ TAGAJ TEMPOJ
TEC PRE 651923 ARANĜO DE TAJPITA TEKSTO
TEC PRE 801322 ARANĜO DE ALFABETA REGISTRO

Trovigas tie ankaŭ referenco al similaj internaciaj kaj naciaj norm-dokumentoj, el kiuj ni notu la ĉeĥoslovakajn ČSN 01 0010 Stavba, členění a úprava technických norem (=Kreo, strukturigo kaj aranĝo de teknikaj normoj).

La unua Esperanto-Normo estas bona inaŭguro de la Esperanta normiga aktiveco.

red-

Suplemento al STARTO 11 (1988) 41-44

Eldonas ĈEA, Praha

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák, 1987

povu defendi mian familion. Kvin jarojn, tiom da tempo mi ne havas.

Majstro: "Jes, mi komprenas. Sed en tiu ĉi okazo tio daŭros al vi dek jarojn!"

Disĉiplo: "Majstro, vi konstante ne komprenas min. Mi bezonas el-lerni skermi laŭeble plej baldaŭ. Tio, kion vi proponas al mi, estas por mi neakceptebla. Tio da tempo mi ne povas al la lernado dediĉi."

Majstro: "Jes. Tamen ĉi-okaze tio daŭros al vi dudek jarojn!"

La disĉiplo ekkomprenis. Restinte ĉe la majstro, li post iu tempo fariĝis eminenta skermisto.

Suplemento

S.l. Problemaro de la esperantigo

Esperantigi la ĉeĥan libron "Kapitoly o sebeobraně" (=Ĉapitroj pri la sindefendo) mi (J.N.) komencis jam en la jaro 1972. Dume mi renkontis multajn malfacilaĵojn. Antaŭ ĉio, al mi mankis iuj bazaj terminoj por diversaj batalagoj, ekzercoj k.t.p. Dank'al Dio tiam aperis la konata verko de T. Ujlaky-Nagy (10), kiun la aŭtoro afable sendis al mi. Ankaŭ preparata Esperanta Bildvortaro (11) tre plifaciligis mian laboron. Memkomprene mi devis iam kaj tiam pliprecizigi aŭ adapti difinojn de fakaj terminoj, kiujn mi trovis en diversaj fontoj. Simile estis necese en iuj okazoj, por bezono de la traduko, pliprecizigi difinojn de iuj komune uzataj vortoj (brako, humero, gambo, bato, frapo k.t.p.). Mi ĉiam klopodis laŭeble ne krei neologismojn. El la registro de la uzitaj terminoj (p.XX-XY) videblas, ke ties plimulto estas kreita el komune uzataj vortoj aŭ el la neologismoj enkondukitaj en Esperanton jam de aliaj aŭtoroj. Malgraŭ tio, pluan kreadon de neologismoj mi ne povis tute eviti. La laboron mi finis sub la gvido de la forpasinta Ing. Eduard Felix (Feliks) en 1974. Sed tiam ni ne sukcesis eldoni la libron. En sekvontaj jaroj mi kelkfoje la tradukon tralaboris. Dume ni aperigis multajn ĉeĥajn verkojn pri la sindefendo, sinprotekto, ĵudo k.s. kaj kelkajn ĉi-temajn verkojn Esperantajn (12-20, 24-26). En la lastaj ni lanĉis proponon de Esperanta terminologio por la frapoj (14-15) kaj bazaj batalagoj uzitaj en la batalasportoj aŭ en la sindefendo (18-

-20, 24-26). Post tiu ĉi preparo mi revenis al la esperantigo de Ĉapitroj ... La finan rafinon de la teksto mi faris dum la jaroj 1987 kaj 1988.

Ĉi-loke mi volas esprimi koren dankon al d-ro Josef Kavka, sen kies helpo, precipe ĉe la kreado de novaj vortoj, mi ne povus realigi la taskon, kiun mi starigis antaŭ min. Mi dankas ankaŭ al s-ano Jaroslav Mařík (Marĵik), kiu atente tralegis la tekston kaj per multaj valoraj konsiloj helpis ĝin korekti kaj plibonigi.

S.2. Listo de uzitaj terminoj (217 terminoj)


S.3. Vortareto

AIKIDO estas japandevena BATALARTO

AKLINO estas ekzerco montrita sur la fig.S1 (ĉefe: klik).

-I fari ekzercon AKLINO.

Fig.S1



ANTICIPI: pli-malpli subkonscie identigi ion venantan.

ATAKANTO vidu sub DEFENDANTO.

BATALAGOLOGIO estas parto de la SINDEFENDOLOGIO, kiu traktas pri la batalagoj.

BATALARTO vidu sub BATALKOMPLEKSO.

BATALKOMPLEKSO estas la nomo por spontane estiĝintaj kolektoj de diversaj atak-metodoj, defend-metodoj kaj taktikaj instrukcioj, eventuale ankaŭ iuj metodoj de la mensa sinpreparo. La plej konataj estas ekz. batalkompleksoj de la ĵudo, JUJUCUO, karateo, AIKIDO, angla kaj franca boksoj k.t.p. La japandevenajn batalkompleksojn oni kutime nomas BATALARTOJ.

BATALSISTEMO estas (en nia senco) kohera tuto de atak-metodoj kaj defend-metodoj kun instrukcioj, kiel uzi ilin en batalo kaj kiel prepari ĝin por batalrenkontiĝo. Ili estas kreitaj sur scienca bazo. Ĝis nun estas kreitaj jenaj batalsistemoj: la sindefendoj MS-1, QS-1 (KvS-1), monosignala sindefendo kaj la ĉefa speco de la karateo nomata BRANAO.

BATO estas frapo realigata per BRAKO (aŭ ĝiaj partoj) aŭ per alia parto de la homa korpo escepte de GAMBO (ĉ: uhoz).

BRANAO estas science bazita ĉefa speco de la karateo, kiun ni kreis por laŭeble plej facila ekrego de la sindefendo MS-1 (ĉ: brana).

BRAKO vidu sub HUMERO.

DEFENDANTO estas (en tiu ĉi libro) ĉiam tiu el batalantoj, al kiu ni konsilas, kiel venki kontraŭulon. Male, la ATAKANTO estas ĉiam tiu, kiu suferu malvenkon.

EKZERCI: ni uzas tiun ĉi vorton ne sole laŭ rekomendo de (22): "lertigi per ripetata praktikado", sed ankaŭ en la senco "evoluigi (plibonigi) sian rapidecon, forton,


paciencon, batalagojn k.t.p. aŭ teni la atingitan nivelon de tiuj per ripetata praktikado? La kialon vidu en (14), p.170.

ELSUBA GAMBOFRAPO estas la batalago laŭ la fig.S2.

Noto n-ro 1: La elsuba gambofrapo estas efektivebla memkomprene ankaŭ el la ceteraj gardostaroj, do ne sole en la ĉi-loke montrita.

Noto n-ro 2: Inter la elsuba gambofrapo kaj la elsuba piedfrapo ekzistas unu sola diferenco: ĉe la elsuba gambofrapo la angulo inter la kruro kaj la femuro de kikanta gambo, dum ties moviĝo celen, ne ŝanĝiĝas.

Fig.S2



EVERTO estas batalago, per kiu oni ĵetas aŭ faligas kontraŭulon teren (19)(ĉ: poraz).

-I ĵeti aŭ faligi kontraŭulon teren per iu EVERTO.

FENTO: (en la SINDEFENDOLOGIO) rapidega elpaŝo (ordinare antaŭen) per la piedo, kiu estas pli proksima al la direkto de la movo. La alia piedo restas surloke (11)(ĉ: výpad).

-I fari FENTON.

FRAPO (en la SINDEFENDOLOGIO) estas ajna batalago, ĉe kiu la kineta energio de iu objekto (armilo, parto de la homa korpo aŭ la homa korpo kiel la tuto) efikanta sur la korpon de la kontraŭulo aŭ iun objekton, ŝanĝiĝas al misforma laboro. En malvasta senco de la vorto ni nomas "frapo" ankaŭ iun ajn imitaĵon de la frapo (en la supre menciita senco), uzata dum ekzercado aŭ en sporto. Vidu sub BATO kaj KIKO (12,14)(ĉ: ŭder).

-I apliki FRAPON kontraŭ iun aŭ ion.

GAMBO: ni uzas tiun ĉi vorton sole en la senco 2 laŭ (22)(p.332), t.e.: "malsupra membro de homo, konsistanta el femuro, KRURO kaj piedo".


GAMBOFRAPO estas speco de KIKO, dum kies efektivigo la kikanta gambo funkcias kiel firma tuto; la frapcelon trafas frapsurfaco, kiu estas lokita sur la fino de la gambo, do sur oportuna parto de la piedo (14).

HUMERO estas en tiu ĉi libro uzata en la senco "parto de la supra membro de la homo inter la ŝultro kaj la kubuto", ĝi do anstataŭas la terminon "brako" laŭ (22) sub 2 (p.122). Ni neniam uzas la vorton "humero" kiel la nomon de la ostoj, kiu trapasas tiun ĉi parton de la supra membro de homo. Por la respektiva ostoj ni rezervas la vorton "humero" (do laŭ la modelo femuro, femurosto). La terminon BRAKO ni uzas ĉiam sole en la senco "supra membro de homo" do laŭ (22) sub 1 (p.122). La supra membro de homo = BRAKO; ĝi konsistas el la mano, antaŭbrako kaj la HUMERO (pli detale vidu en /14/).

IMPENDO estas ekzerco laŭ la fig.S3 (ĉ: shyb).

-I fari ekzercon IMPENDO.

Fig.S3



INTERBATALO estas batalo, en kiu ĉiuj batalantoj scias, ke ili troviĝas en la batalosituacio (kontraste al INSIDATAKO, kie atakoto tion ne scias).

-I partopreni INTERBATALON.

JUJUCUO estas japandevena BATALARTO, el kiu eliris Ĵigoro Kano, kreade la Ĵudon.

KENDO estas japana speco de skermo.

KIKO estas FRAPO efektivigata per GAMBO aŭ ĝiaj partoj (10,12,14, 15,21)(ĉ: kop).

-I realigi KIKON.

KOANO: tasko, kiujn donadis kaj -as majstroj de la Budhisma skolo ZENO al siaj disĉiploj por meditado.

KRURO vidu sub la GAMBO.

LAKTIDZO: alklin-piedfrapo flanken (fig.32)(ĉ: kyvny kop stranou).

-I apliki la alklin-piedfrapon flanken.

LOZA: malstreĉita (22).

LUKTUMO estas batalago, kiu ne havas karakteron de frapo. La luktumoj oni uzas ekzemple en la Ĵudo aŭ lukto. La plej gravaj klasoj de la luktumoj estas EVERTOJ, ROMPUMOJ kaj STRANGOLUMOJ (12,13,18)(ĉ: chvat).

-I fari LUKTUMON.

MALLONGA DISTANCO: vidu sur la fig.S4.


MEZDISTANCO: vidu sur la fig.S4.

-E (stari) vidu sub MEZDISTANCO.

Fig.S4

a - mallonga
distanco

b - mezdistanco



MONOSIGNALA IDENTIGO: defendanto konstruas situacion tiel, ke ne povu ekesti certa klaso de aferoj, kiuj estas por li dangeŝraj. Estigon de tiu ĉi situacio li identigas kaj ĝi estas por li la signalo, laŭ kiu li komencas sian agadon. Surbaze de tiu ĉi identigo estas konstruita la t.n. monosignala sindefendo.

MULTISIGNALA IDENTIGO: batalanto identigas (anticipas) el signoj de situacio la plej verŝajnan sekvantagadon de kontraŭulo kaj surbaze de ĝi li agas. Memkomprene tiu ĉi anticipado estas nepre probableca; anticipata afero povas, tamen ne nepre devas okazi, estas eblaj ankoraŭ aliaj evoluoj de la situacio. Tial la nomo de la identigo: la multisignala. Sur ĝia bazo staras (parte) la klasikaj batalkompleksoj

LA VERDA STACIO

Ĉu afero forgesenda kaj forĵetinda?

En la "Internacia Ĵurnalisto", n-ro 3/1987 (Sofio), Bernard Golden fine sukcesis publikigi venenakran kritikon, verkitan antaŭ 3-4 jaroj kaj al mi kopie senditan, sub la titolo "Malbongusta plado el la arta kuirejo de ĉeĥaj poetoj kaj prozistoj". La kritiko trafas la broŝuron En la koro de Eŭropo, aranĝitan de Josef Rumler (eld. ĈEA, 1983). Ne estas mia celo tusi la kritikon pri la uzita lingvaĵo en la verko, kiun Golden trovas "speco de piĝin-Esperanto fare de la tiel nomataj "majstroj de la vorto", "stilaj bizaraĵoj", "harstarigaj ekzemploj ... de vorta labirinto", kaj "la plej ri-proĉenda parto: ĝia sinteno al neologismoj" kun la konkludo "la ĉeĥaj poetoj kaj prozistoj en sia arta kuirejo devas unue lerni boligi akvon antaŭ ol provi surtabligi festan manĝon"...

Mi deziras oponi al Golden en jena afero: en lia moka juĝo pri la valoro kaj signifo de la estinta "VERDA STACIO", t.e. artprogramoj de la Ĉeĥoslovaka Radio en Esperanto. Tiun rememoron skribis por la verko ĝia aktiva kunlaborinto en Brno, nia fama romanverkisto Nacia Artisto František Kožík.

Golden titolas tiun rememoron "nostalgia fanfaronado" (!) kaj prezentas la demandon: "Kiun efikon aŭ influon havas la Verda Stacio en la nuntempo?" kaj mem respondas: "Absolute nenium! Ĝi estis nura efemeraĵo. malaperinta por ĉiam ... Kian valoron havas la fanfaronado pri eventoj okazintaj antaŭ jardekoj en Ĉeĥoslovakio?"

Tiu ĉi juĝo oni povas apenaŭ nomi alie ol cinikaĵo. - La artprogramoj de la Verda Stacio en Brno (antaŭ la milito) kaj en Prago (post la milito) reprezentas, unufoje por ĉiam, unu el la plej gravaj ĉapitroj de la Esperanto-kulturo kaj serio da gravaj agoj nepre pioniraj, senprecedencaj. La entuziasmaj aŭskultantoj mem donis la titolon Verda Stacio kaj raportis pri la granda valoro de la elsendoj por ili.

Pri tia parto de la kulturo en Esperanto la esperantistoj povas fieri. Profesiaj artistoj, ellerninte Esperanton, unufoje en la historio surscenigis oficiale operojn en la internacia lingvo (Vendita fianĉino kaj du pluaj), unufoje operetojn (ekz. Pola sango de Nedbal), dramojn (ekz. RUR de Capek). La prezentintoj estis renomaj artistoj de la Nacia teatro (ekz. Karel Höger, Navia Artistoj) aŭ de la Radio. - Realigis la unuan fojon internacia programtranspreno el Brno fare de radiostacioj Lyon PTT, Kaunas kaj Klajpeda (la opero Kiso de Smetana, en Esperanto). Nia Radio unufoje en la historio enkondukis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto.

Ĉu tio ĉi ne estis pionira ago, meritanta daŭran admiron, kaj ne eternan forgeson? La signifo de la Ĉeĥoslovaka perradia aktiveco en Esperanto estas neforviŝebla ĉapitro de ĝia kulturhistorio, fenomeno, kiun s-ano Golden ne volas rekonii.

Mi kredas, ke neniŭ esperantisto en Ĉeĥoslovakio obeos la proponon malpermesi ĉeokazan rememoron pri iu ajn grava ĉapitro de la Esperanto-movado en tiu lando.

Jaroslav Mařík
(siatempa aktivulo de la
Esperanto-elsendoj)

ANKORAŬ KELKAJ DONITAĴOJ PRI LA FAMILIO KÖVARY

Bernard Golden

Tiu ĉi artikolo estas suplemento de mia verko titolita "Pli da sciigoj pri la familio Kövary" /Starto n-ro 2/88/.

Post ricevo de la unua informo pri la familio Kövary de s-ro Jaroslav Mařík el Prago, mi komencis serĉi donitaĵojn pri la familio en Nov-Jorko, kaj mi iomete sukcesis. Unue, mi atentigis s-ro Mařík, ke laŭ registraĵo en adresaro de nordamerikaj esperantistoj, la voknomo de la patro estas Olivio kaj ne Julio, kiel li informis en sia artikolo publikigita en Esperantista, la organo de EAĈSR /Prago, 1946, vol. 1, n-ro 3, pĝ. 33/. Revenposte s-ro Mařík provizis min per pli da detaloj koncernantaj la rilaton inter la redaktoro de Esperantista, d-ro Stanislav Kamaryt, kaj la familio Kövary. En informo sendita al s-ro Mařík, d-ro Kamaryt nomas la patron Julio sed neglektas identigi la filon, kiu vizitis la Esperanto-klubon en Prago en aprilo, 1945. Tiu viro, kiu tiutempe estis oficiro en la usona armeo, haltis en Prago dum vojaĝo de Budapeŝto al Berlino, kie li postenis. D-ro Kamaryt bone konis la familion el la tempo, kiam li estis gimnazia direktoro en Bratislavo ĝis 1938. Ankoraŭ unu fakto menciita de d-ro Kamaryt estas, ke en la familio estas du filoj. Ĉe la fino de sia letero al mi, s-ro Mařík levas la demandon, ĉu la nomo Olivio eble estas tiu de unu el la filoj.

Pli da spurado en malnovaj publikigaĵoj ebligis al mi solvon de parto de la enigmo. En la Jarlibroj de Universala Esperanto-Asocio, aldonitaĵe en la 1960-aj jaroj, troviĝas rubriko, sub kiu estas listigitaj denaskaj esperantistoj, t.e. homoj, kiuj lernis Esperanton en sia familio ekde infanaĝo. En la Jarlibro por 1966 /parto 1, pĝ. 81/ aperis la unuan fojon la nomoj de du filoj de Olivio Kovary. Ernest E. Kovary, kiu naskiĝis la 2-an de aprilo, 1919, loĝis en la urbo Nov-Jorko. Lia pli juna frato, Tom T. Kovary, naskiĝis la 23-an de junio, 1920, kaj tiutempe loĝis en la urbo Ithaca en la stato Nov-Jorko.

Mi skribis, ke mi nur parte solvis la enigmon, ĉar ankoraŭ estas trovendaj respondoj de la sekvaj demandoj. Ni nun scias la nomojn de la patro kaj la du filoj, do kiel klarigi la nomon Julio, menciitan de d-ro Kamaryt? Kiu el la du filoj estis la usona armea oficiro, kiu vizitis la Esperanto-klubon en Prago? Kaj fine, kio okazis al tiuj du denaskaj esperantistoj, kies lernejaĵaj dokumentoj atestis, ke ilia gepatra lingvo estas Esperanto?

Novembro, 1987



el viaj leteroj

Mi vokas ĉiujn esperantistojn kaj homojn de bona volo iniciative kaj plej firme starigi sin kontraŭ la monda malbono. Ĉiu de ni komencu de si mem kaj bonan ideon propagandu ne nur per vortoj, sed ĉefe per agoj.

Mi travivis terurojn de ambaŭ mondmilitoj kaj certe kun mi homoj de pli aĝa generacio konfirmas, kiel senmezuran suferadon alportis ĉiu milito. Ĉiu civitano de nia planedo tre bone ekkonas la bonon disde la malbono kaj ĉiu ŝatas nur bonon.

Ĉiutagaj informoj en gazetaro, radiofonio, televido pri pli-grandigado de nuklea armado estas signo de tio, ke ekzistas fortoj de malbono. Nuklean atakon ne travivus la homoj, sed samtempe estus en momento neniigita tuta flauro kaj faŭno de nia planedo (kiel antaŭdiris Sybilla). Tion ĉion preparas tre inteligenta kaj same malinteligenta malbona homo. Hodiaŭ temas simple pri tio, ĉu ekzisti au ne ekzisti, ĉu la homaro travivos au la vivo sur nia planedo pereos.

Lingvo komuna al la tuta mondo, por ke la homoj komprenu unu la alian kaj rilatu amike kaj pace, naskiĝis en la jaro 1887 kaj cent jaroj perfekte verifis ĝin. La esperantistoj per ripetado de bazaĵoj kaj ĉefaj agadoj povus multe kontribui. Se esperantistoj transprenus iniciativon de "bono" en siajn manojn, ne estus estonte necesaj arestejoj nek kazernoj kaj ankaŭ ne preĝejoj - estus surtera paradizo!

Nia naskiĝo havas signifon en la laboro, sufero kaj morto. La suno kulpigis, ke unu estas blankulo kaj alia negro, sed ĉiuj estas mortontoj kaj pro tio ni ne malamul! Jozefo Chmiel, Český Těšín

Belan donacon okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto preparis opera ensemblo de la teatro de F. X. Šalda en Liberec la 30an de januaro 1988 en antaŭtagmeza matineo, pri kiu vi povis vidi ankaŭ soton en nia televido. Kantis solisto de Nacia Teatro en Prago kaj gastis niaj operaj artistoj Miroslav Smyčka, solisto de ŝtata opero en Ústí n.L., kaj Josef Vích, membro de Nacia Teatro en Prago, kiuj prezentis en la unua duono de la programo konatajn operariojn de la ĉeĥa opera verkaro en elstaro traduko de Tomáš Pumpr kaj Rudolf Hromada. La unika interpreto de ambaŭ niaj artistoj faris ĉi tiun parton de la programo neforgesebla por ni - ĉeestantoj. Ilia klara elparolmaniero sonigis puran Esperanton kaj estis eĉ unika propagando de Esperanto por ĉeestanta neesperantista parto de la teatra publiko (amikoj de la opero de libereca teatro). Enkondukon al la koncerto en senerara Esperanto prelegis membro de teatra ensemblo Lubomír Tlalka. La tutan programon interese kaj sprite akompanis regisoro Oldřich Mrnák, kiu per populara klarigo proksimigis unuopajn partojn de la programo al la publiko. El la dua parto de la programo, propra donaco de la libereca opero al la esperanta publiko kun unikaj kantistaj interpretoj oni ne povas forgesi Blanka Černá en ario el Orfeo kaj Euridike de K. W. Gluck, Maria Kremerová en Forto de la sorto de Giuseppe Verdi, Stanislav Dašek kiel Jontek en Halka de Moniuszko, Arnošt Klíma en Rondo el Faust de Gounod kaj ĉiujn aliajn savvalorajn prezentaĵojn. Suverene per fortepiano akompanis dirigento Boris Joneš kaj Jiřina Permanová. Niajn sentojn bele esprimis Oldřich Mrnák en la finvorto per metaforo, ke la internacia lingvo de interkompreniĝo ne estas nur Esperanto, sed la muziko mem.

Hradil

...Mi mem akcente rifuzas la "riĉigon" de la vortĉezoro de Esperanto. Jes, estas necesaj sufiĉe multaj novismoj aŭ novesprimoj, kauzataj pro ekesto de tute novaj nocioj sekve de la entuta evoluo de la tekniko kaj scienco. Estante mem membro de fakterminara fervojista komisiono, mi tamen kontraŭadis ĉiujn emojn proponi neologismojn kaj feliĉe fine la ceteraj kunlaborantoj konvinkigis, ke eblas formi ankau novajn terminojn per kunmetado de konataj vortoj.

Kial mi rifuzas la novismemulojn? Respektinda por mi estas la genieco de Zamenhof, kiu ne nur sukcesis pleje simpligi la gramatikon de sia lingvo, konservante tamen la nepran klarecon de esprimo, sed li ankau ebligis al la adeptoj de Esperanto vaste eluzi la vortfaradon pere de afiksoj kaj kunmetitaj vortoj. Guste ankau pro tio Esperanto estas facile lernebla, ĉar ĝi ne posedas multajn sinonimojn, kies kreadon postulas ĉefe la poetoj kaj beletroverkistoj. Ili studu la verkaron de Zamenhof mem kaj de liaj senperaj lingvaj majstrantoj. Ĉu la klasikaj tradukoj de mondfamaj beletraĵoj ne pravas, ke eblas per sinonimoj trafe esprimi la originalajn valorege brilajn verkojn? Se niaj poetoj kaj verkistoj daurigis la kreadon de "literature necesaj" vortnovismoj, ili akiros tian staton, ke ekzistos du Esperantoj: unu por "simplaj" homoj, kiuj emas uzi ĝin por interkomprenigi kaj interamikiĝi kun la tuta homaro, kaj dua, kiun komprenos nur "altrangaj, eminentaj" ankauesperantistoj, vivantaj per Esperanta literaturo. Ĉu tio estas ilia celo? Ne, ni ege klopodu konservi la simplecon de nia lingvo, kiu tute ne bezonas "plibeligadon" por sole literaturaj kaj poemaj celoj...

Ing. Jaromír Řebíček, Havl. Brod

Se oni gvidas tradukan konkurson kaj instruas progresantojn, oni devas obei la gramatikon. "ĜOJI" estas ne-transitiva verbo kaj ne eblas uzi la esprimon "ĝojas min". Guste estas "ĝojigas min" aŭ "mi ĝojas ... ke, pri ..." aŭ "estas ĝojo por mi, ke". Ne temas pri tajperaro en VF n-ro 3/87 p. 6, ĉar la esprimo "ĝojas min" ripetigas dufoje. Mi protestas.

H. Š.

PAVEL ROSA,

sperta tradukanto el la slovaka prozo kaj poezio, dum jardekoj kolono de la Esperanto-movado en Slovakio, mortis la 28-an de junio 1988 en Bratislava.

Li estis komitatano de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, prezidanto de la Slovaka Esperanto-organizaĵo (SES, poste AESSR). Li kompilis televidan kurson de Esperanto, kun Fr. Satura li estis aŭtoro de lernolibro de Esperanto por kursoj kaj memlernantoj, li gvidis Esperanto-rubrikojn en ĵurnalo Smena kaj gazeto Nedeľa, liaj literaturaj tradukoj estas en Ĉeĥoslovaka antologio kaj en Slovaka antologio.

Al niaj slovakaĵaj samideanoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

IMPRESOJ EL "ARTA SEMAJNO 86"

Kiel konate, en tagoj de la 8-a ĝis la 15-a de majo 1988 okazis en Halle/Saale - naskiĝurbo de fama komponisto G. F. Handel, kulturaranĝo por esperantistoj-kreuloj "ARTA SEMAJNO". Estis ĝojiga ne nur la realeco, ke "AS" okazis en regiono de du grandeguloj de tutmonda muziko G. F. Handel kaj J. S. Bach, sed ankau, ke "AS" estis aranĝita en agrabla jarsezono - printempo, kiu ĉi-jare vere favoris kaj ĉefe, "AS" estis aranĝita en moderna klubejo de germana junularo, kiun klubejon povus al ili enŭii kiu ajn en tuta Eŭropo.

En Halle/S. okaze de "ARTA SEMAJNO" renkontiĝis diversaj art-grupoj, sed ankau individuaj aŭtoroj de diversaj ĝenroj (plastikarto, teatro, muziko, literaturo kaj fotografado) kaj ni povis vidi vere esperigajn rezultojn. Ĉi tie renkontiĝis E-kreuloj el diversaj landoj - ĉefe socialismaj, kaj domage, ke tiu ĉi afero ne estas konata ankau en pluaj landoj nesocialismaj, ĉar kiel montriĝis, la amikeco de bonaj kaj sinceraj homoj ne konas landlimojn kaj tiel estu ĉie kaj ĉiam! Estis ligitaj novaj kontaktoj kaj koneksoj, nefakuloj spertiĝis per fakuloj (kaj senpage, alilande oni nome devas pagi), fakuloj spertiĝis per tio, kion ili ne atendis kaj ne kalkulis. Germanaj esperantistoj aranĝis "ARTAN SEMAJNON" kvankam oni tion nomus la "ARTA MONATO", ĉar semajno estas tre mallonga kaj adiaŭado estas poste pli kruela. Feliĉe ĉi tie estas ankoraŭ poŝtoŭicejoj, kiuj al ni peradas kontaktojn plu. Tamen, la "AS" partoprenis ankau pli aĝaj esperantistoj el diversaj landoj kaj ĉi tie inter la junaj ili rejuniĝis je 30 jaroj, ĉar la popolo saĝeco diras, ke "kompatema mensogo estas ofte pli utila, ol pura vero"! Ĉi tie ni pli aĝaj mensogis al ni, ke ni estas ankoraŭ junaj, sed nun alvenis kruela realo kaj pro tio estus bezone aranĝi da tiaj aranĝoj pli multe, por ke ni povu mensogi al ni plu "kompateman mensogon".

Rilate fakopiniojn kaj politikkoncepton mi opinias, ke tia agado kiel "AS" estas "la perono de esperigaj talentuloj", ĉar en la mondo nome kutimas, ke sukceso fremdlande estas ankau la sukceso hejme. Pro tio oni nome en la mondo aranĝadas diversajn festivalojn artajn, sciencajn, teknikajn, sportajn kaj aliajn, sed tiuj ĉi aranĝoj kaj konkuroj havas signifon sole por tiuj ĉi fakoj. "ARTA SEMAJNO" estas aranĝo pure Esperanta, kio ja havas signifon antaŭaĵo por la ESPERANTO-MOVADO, kiu estas la tutmonda kultura afero batalanta por la ideo, ke "la homaro jam fine devus interkonsenti pri ia pli bona metodo de la vivo sur la tero, kaj estus aprobita kiel oficiala internacia lingvo - ESPERANTO". Dume tio estas la angla, sed la angla intencas antaŭaĵo siajn proprajn interesojn potencajn. Krome, la angla estas unu el la plej malfacilaj lingvoj entute kaj ne ĉiu homo estas lingvotalentoplena. Ja Esperanton povas ellerni absolute ĉiu kaj sentalente. Krome, Esperanto politikvidpunkte apartenas al neniu kaj tamen al ĉiuj - Esperanto do estas absolute demokrata. Jen la diferenco! Sekve - E-Movado ne estas ia "klubo de ĝardenuloj", kiuj pasigas tempon per iaj hobiaj. E-Movado volas kontribui al ŝanĝo de la mondo kaj elkreo de pli bonaj kondiĉoj sur la tero, pro tio estas interalie aranĝataj tiaj kulturaferejoj kiel estas "ARTA SEMAJNO 88" en Halle/Saale, kaj estus bezonate, ke oni tiajn "AS" aranĝu ĉie - en la tuta mondo. Ankau G. F. Handel kaj J. S. Bach el tiu ĉi regiono estis siatempe progresaj pioniroj de ĉio ebla kaj mi opinias, ke ili kun ideo de ESPERANTO-MOVADO certe konsentus kaj aliĝus al ni ankau. Sekve: "Q.B.F.F.S." = "Quod bonum, felix, faustum, fortunatumque sit!" = "Ke tio estu bona, feliĉa, favora kaj sukcesa!"

Jiří Čelíkovský
pentristo kaj skulptisto

KONVERSACIO por progresintoj



Deksesa temo : NATURAJ SCIENCJOJ

Naturo estas ĉio, kio ekzistas en la mondo. Oni distingas mineralojn, vegetaĵojn kaj animalojn, kiuj evoluas, moviĝas kaj rilatas laŭ konstantaj universalaj principoj kaj leĝoj. Mineralogio instruas pri mineraloj, kiuj estas ŝtonoj, teraĵoj, ercoj, akvo kaj aliaj partoj de la tera krusto. Ili evoluas malrapide, iuj kristaliĝas. La geologio priskribas la evoluon de la tera krusto. Botaniko priskribas vegetaĵojn kaj zoologio animalojn. Ties evoluo estas pli rapida, ŝanĝoj estas sekvigataj eĉ per propra agado. La esenco de ĉiuj naturaj fenomenoj estas materio, unuopaj substancoj havas parton de tiu materio, kiu nomiĝas maso. La substancoj estas ŝanĝataj per fortoj eksteraj kaj internaj. La fiziko priskribas efikadon de fortoj, kiuj ne ŝanĝas la esencon de substanco. Tiel oni trovis molekulojn, sed la kemio kapablas dividi eĉ tiujn molekulojn kaj trovi 92 diferencajn atomojn. Do oni trovis 92 elementojn, kiam oni en laboratorioj analizis molekulojn. Puraj elementoj estas raraj, oni atomojn sintezas kaj alikombinas. Sed eĉ kombinaĵoj, kies molekuloj estas egalaj, estas raraj, ĝenerale ekzistas miksaĵoj kun diferencaj molekuloj. Ĉar la homo ekkonis tiun staton kaj tiujn principojn, do oni eluzas ilin al sia prospero kaj kapablas pretigi materialojn artefaritajn.

La fiziko estas origina natura teorio, en la dekseca jarcento oni kredis pri kvar elementoj: akvo, tero, aero, fajro, kiuj estas el atomoj. Alĥimio strebis trovi eliksiron de vivo kaj prepari oron el krudaĵoj. La eksperimentoj de la alĥimio tamen gvidis al la kemio, kiu ordigis elementojn en tabelo, instruis pri konsisto de kombinaĵoj, kiel acidoj, alkaloj, oksidoj, saloj kaj aliaj.

La sekva esplorado pri la "nedisbatebla" atomo gvidis al ekkono, ke atomoj estas komplikaj sistemoj: kerno aŭ nukleo havas pozitivan elektran ŝargon, ĉirkaŭ la nukleo cirkulas malpezaj elektronoj negative ŝargitaj. Tial la tuto estas elektre neŭtrala. La nombro de elektronoj estas de 1 ĝis 92. Sed la nukleo, en kiu estas la ĉefa maso, konsistas el pezaj protonoj pozitive ŝargitaj, kies nombro egalas al nombro de cirkulantaj elektronoj. Krome estas en la nukleo preskaŭ same pezaj neŭtronoj, kiuj ne havas elektran ŝargon. Plej simpla atomo estas tiu de hidrogeno: unu protono kiel nukleo, unu cirkulanta elektrono. Sed la dua elemento en la tabelo, helio, havas jam nukleon el du protonoj kaj du neŭtronoj, cirkulas du elektronoj, do ĝi estas kvaroble pli peza ol tiu de hidrogeno. La nombro de neŭtronoj povas esti diferenca, tiaj atomoj estas izotopoj. La elementoj, kiuj havas multajn protonojn kaj elektronojn, estas radioaktivaj, radias kaj ŝanĝas la esencon de elemento. Krom tiuj tri korpuskloj ekzistas eĉ

aliaj korpuskloj, kies ekzistado alportas surprizojn, ĉar tiuj korpuskloj povas gvidi al novaj formoj de materio, oni parolas pri antimaterio, aŭ al novaj fenomenoj.

Biologio estas scienco pri fenomenoj de la vivo kaj ties formoj. La elementa ero de viva korpo estas ĉelo, kies maso estas protoplasmo. Pluraj celoj konsistigas histojn. En la ĉelo estas molekuloj de albuminoj, kiuj estas tre komplikaj.

La fiziko estas nuntempe teorio pri naturaj procedoj, dum kiuj la substanco ne ŝanĝas sian esencon. Ties branĉoj estas mekaniko, teorio pri movoj, dinamiko, teorio pri fortoj, optiko pri lumo, akustiko pri sono, astronomio, magnetismo, elektro kaj aliaj. La materio estas inerta, la fortoj strebas nuligi tiun inertecon. Se la fortoj estas en ekvilibro, do la substanco estas en relativa kvieto aŭ trankvilo. Sed kiel en la atomo cirkulas elektronoj, tiel molekuloj oscilas, moviĝas kaj ekspansias. Tion sekvigas la varmo, ekzistas agregatoj de substancoj: solida, likva, gasa, plasma. En solida stato la molekuloj estas koheraj, en aliaj malpli. Energio estas kapablo direkti forton por certa efiko, estaĵoj la energion ricevas kaj eldonas, tial estas ŝanĝoj kaj movoj.

La homo vivas en aero, tiu premas la korpon, sed la aero en la korpo tenas ekvilibron. Se ne estas ekvilibro, la homo bezonas skafandrojn, kesonojn aŭ klosojn.

Magneto estas peco de fero, kiu kapablas altiri aliajn pecojn de fero, malpli ofte de alia metalo. La magnetismo estas perdita, se oni la magneton tremigas aŭ varmigas.

Elektronoj de atomoj povas amasiĝi, aperas fenomenoj de statika elektro, alie oni povas per tensio gvidi elektran fluon aŭ kurenton tra kondukiloj. Tiu kurento estas kontinua, se la elektronoj iras en konstanta direkto, aŭ alterna, intermita, se la direkto estas ŝanĝata en certa frekvenco. La kurento fluas en kondukiloj, ĝi estas ŝirmata de izoliloj, ĉar la kontakto de korpo kun kondukilo en certa stato povas esti danĝera. La kurenton liveras baterioj de galvanaj piloj, akumulatoroj kaj generatoroj, kiuj estas dinamoj aŭ alternatoroj. La kurenta cirkvito estas fermita, la kurento en ĝi cirkulas de fonto al konsumilo kaj reen. Bonaj kondukiloj estas metaloj kaj substancoj malsekaj, forta kurento aŭ forta statika elektro kapablas trairi la izolilon, aperas sparko, en la naturo tio estas fulmo. En la elektraj konsumiloj estas valvoj aŭ elektrondampoj kaj relajsoj, kiuj reguligas la efikon, reostatoj, kiuj reguligas la reziston en kondukiloj, fotoĉeloj, kiuj reagas al la lumo, transformatoroj, kiuj ŝanĝas tension, kondensatoroj, kiuj kuncentrigas sargojn, transistoroj, kiuj influas la kurenton. Elektro estas alkondukata per kabloj al motoroj, buldozoj kaj arganoj, per troleo al trafikiloj. Elektromagnetaj ondoj iras tre rapide tra aero, aliaj materialoj, sed eĉ tra vakuo, kiu estas en la kosmo kaj en laboratorio atingebla nur per vakuigilo. Ili ebligas transporti programojn de radio kaj televido. Lumo estas simila elektromagnetaj ondoj, kiuj kuncentrigas per lenso kaj plifortigas en laseroj.

La sono estas ondoj , kiuj disvastigas de fonto en formo de densigado kaj maldensigado de aero au alia substanco . Kaj tiujn ondojn perceptas orelo .

La homo agis en la naturo komence kiel animalo . Sed kiam oni ekkonis la naturajn principojn , do la agado fariĝis pli intensa kaj alportis krom intencataj efikoj eĉ efikojn neatenditajn kaj malfavorajn por la naturo , sed alfine eĉ por la homo mem . Tial la homo lernas nuntempe agi laŭ la ekologio , por ke la rezultoj estu nur favoraj .

GRAMATIKO : 1 Trovu kvin taŭgajn vortradikojn kaj derivu el ili plej multe da vortoj uzonte ilin en frazoj . 2 Elektu kvin vortradikojn kaj formu el ili vortojn kun sufiksoj /ig/ kaj /ig/ . Uzu duopojn en bonaj frazoj

STILO : 1. Skribu dialogon pri la elektro , ekzemple pri avantaĝoj , pri sekureco , pri konsumiloj , pri aĉetado ks. 2. Traduku instrukcion por uzado de elektra konsumilo

DEMANDOJ : 1 Kio estas en laboratorio ? Kie estas laboratorioj ? 2 Kion vi scias pri vakuo ? Kie estas vakuo ? 3 Ĉu vi kapablas klarigi pumpadon ? 4 Skizu simplan elektran instalacion kaj klarigu en Esperanto 5 Kiaj estas elektraj tensioj ? Kiu tensio estas danĝera por homo ? 6 Kio estas kurta konekto ? 7 Kion vi scias pri la ekologio ?

Josef Chvosta

RONDETA VIVO



ČESKÉ BUDĚJOVICE La jarkunveno de klubo "La Progreso" okazis la 26-an de marto 1988 en Parko de Kulturo kaj Ripozo en České Budějovice. La kunvenon ĉeestis kvindek da anoj kaj simpatiantoj kaj ankaŭ la prezidanto de ĈEA Ing. Petr Chrdle kaj reprezentanto de la Esperanto-rondeto en Písek. La klubo regule eldonas gazeton La Progreso kaj kluban bultenon Sudbohemia Esperantisto, organizas Esperanto-kursojn en diversaj organizaĵoj en Ĉ. Budějovice, Hluboká n. Vltavou kaj Netolice. En novembro 1987 la klubo aranĝis la tradicion autumnan renkontigon de sudbohemiaj esperantistoj, en Muzeo de laborista movado aranĝis sukcesan ekspozicion honore al la 100-jara jubileo de la unua Esperanto-lernolibro kaj en februaro okazigis tre sukcesan unuan maskobalon. Omi planas tre ampleksan aktivecon en la nova agadperiodo, eks. kunlaboron kun la Distrikta Pac-Konsilantaro, reklamom en kinejoj, afisom por la tutetata agrokultura ekspozicio, eldonon de Esperanta libroj, kasedoj kaj videokasedo ktp. - La klubo sukcese aranĝis la konsultigon de Esperanto-asocioj el socialismaj landoj en aprilo. Kaj oni preparas la tradicion autumnan renkontigon de sudbohemiaj esperantistoj, kiu okazos sabato la 19-an de novembro 1988 en Kulturcentro Hroznová kaj maskobalon sabato la 4-an de februaro 1989. (laŭ Sudbohemia Esperantisto)

HAVÍŘOV Pri la Universala Kongreso en Varsovio rakontis prof. Miloslav Pastrňák je la 21-a de aprilo. Li paroladis laŭ tekstoj de sia filino, kiu partoprenis la Kongreson, sed ne povis persone komuniki siajn impresojn al la rondetanoj pro malsano. - Du gesamideanoj aligis al la UK en Rotterdam. - Je la 19-a de majo paroladis Jarmila Pastrňáková pri siaj belaj libertempoj en nia patrujo, en Jizerské hory kaj en České středohoří. Belaj diapozitivaj estis projekciataj dum ambau vesperoj. - Nevidanta

s-ano Demčík rakontis, kiel li lernis Esperanton nur per aŭdo - tio estas unika afero en nia movado - kaj pri sia lernado de la brajla skribo. Ankaŭ li informis pri agado de la sekcio de nevidantoj. Ambau vesperoj estis tre interesaj. (ASt.)

HRADEC KRÁLOVÉ Post dek du jaroj oni rekomencis instruadon de Esperanto en januaro 1988. En la kurso laŭ ABC-lernolibro instruis Karel Kopecký kaj Jan Toman. La kurso finigis per ekzamenoj parolaj kaj skribaj kun jena rezulto: 7 kursanoj - emine, 2 kursanoj - tre bone. Ĉiuj jam vigle korespondas, 2 kursaninoj aligis al SET Lančov (unu kun sia tuta familio). Ĉiuj volas progresi autume en la kurso por progresantoj, kiun gvidos s-ano Toman el Jaroměř. Samtempe okazos nova kurso por komencantoj en Kulturdomo ROH enkadre de ĝia instruprogramo. Oni uzos diapozitivon en kinejoj kaj malgrandan ekspozicion en KD. (laŭ K. Kopecký)

LIBEREC La jarkunveno de la Klubo de esperantistoj en Liberec okazis komence de februaro 1988. Estis elektita nova komitato, kies prezidanto fariĝis Ing. Pavel Vlado. - Membroj de la klubo helpis ĉe fondo de novaj Esperanto-kluboj en Česká Lípa kaj Železný Brod. - En septembro 1987 eklaboris nova pionira infan-rondeto gvidata de Milan Kazdara. La infanoj agrabligis la Nikolaan vesperon en Jablonec n. N. kaj la Kristnaskan vesperon en Liberec. - Okaze de datrevenoj de la liberigo de nia lando la klubo aranĝis longdistancajn Venko-marŝojn; en 1987 ĝi estis marŝo de Ještěd al Semily, en 1988 de Ještěd al Kozákov. Omi planas arangi somerajn semajfinojn en "Bohemia Paradizo". (laŭ Libereca Informilo)

OLMOUC Parko de kulturo kaj ripozo (PKR) en Olomouc disponigis al sia Esperanto-rondeto memetaran klubojn en nove konstruita Domo de kulturo en kvartalo Nové Sady, Skupova str. 6. Tie okazas nun ĉiumarde klubaj kunvenoj kaj ankaŭ kurso por progresintoj. - Distrikta arkivo en Olomouc akceptas nun je propono de Esperanto-rondeto ĉe PKR en Olomouc por enarkivigo ankaŭ gravajn dokumentojn pri agado de esperantistoj en distrikto de Olomouc. - Jarkunveno de E-Rondeto ĉe PKR en Olomouc okazis la 15-an de marto 1988. Ĉeestis 43 membroj de la rondeto kaj gastoj, inter ili nova gvidanto de sekcio por eksterlerneja klerigado ĉe PKR en Olomouc k-do Petr Poč, plue prezidanto de pacsekcio de ĈEA s-ano Drahomír Kořvara el Ostrava kaj delegitoj de Esperanto-kluboj en Přerov kaj Prostějov. (Dr. Mohapl)

PRAHA La jarkunveno de la Esperantista Klubo en Prago okazis la 23-an de februaro. Partoprenis ĝin ankaŭ la prezidanto de ĈEA, membro de la klubo Ing. Petr Chrdle. Omi elektis novan komitaton de la klubo; nova prezidanto fariĝis Ing. Ludvík Veselý, en la komitato estas plue ges-anoj Ondráček, Křesinová, Hubnová, Štruncová, Havlík, Piškůvková, Sihelník, Patera, Šperling kaj Vích, en la revizia komisiono estas Kadlecová, Ing. Křail, Kyzčl kaj Ševčík. Estis akceptitaj laborplano kaj buĝeto por la jaro 1988. - La 12-an de majo okazis la unua publika kunveno de la klubo malfermita al la neesperantista publiko. La ĉeestantaj gastoj aŭdis prelegeton pri Esperanto kaj E-aktivecoj kaj poste aktirino Eva Seemannová prezentis ĉehlingvan dramon "Kvindek jarojn sub masko", kiun por sia jubileo verkis ĉestmír Vidman. La publiko longe ovaciis al la aktorino kaj al la ĉeestanta aŭtoro. Per siaj ĉehlingvaj jarkvaronaj publikaj kunvenoj la pragaj esperantistoj intencas kontribui al pli bona kaj altnivela informado de la neesperanta publiko. - La 16-an de majo vizitis la kunvenon de la klubo s-ano Simo Milojević, ĝenerala direktoro de UEA. Li rakontis pri la laboroj de UEA, pri librogladonado, pri organizado de universalaj kongresoj kaj respondis vicon da demandoj de ĉeestantaj klubanoj. La vespero kum la simpatia gasto estis tre interesa kaj la praganoj esperas pli ofte renkontiĝi kun li. (red-)

VÍTKOVICE Vintre ĉi-jare reciproke renkontiĝis anoj de Esperanto-kluboj Vítkovice kaj Žilina. Tiel ekestis amikeco, kiu alportas al ambau E-kluboj avantaĝojn kaj pliricigas iliajn programojn. Amikoj el Žilina estas ĉiam bonvenaj ĉe la klubaj kunvenoj en Vítkovice kaj povas partopreni aferojn, kiuj estas por ili interesaj, kaj male. Aprile anoj el E-klubo Vítkovice vizitis amikojn el Žilina, kie ili estis sincere (fimo sur pg. 28)

CAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

10. Interlingua

Antau la dua mondmilito estis fondita la asocio IALA /Internacia Asocio por Helplingvo - International Auxiliary Language Association/, kiu trovis sian sidejon en Usono. Dum tridek jaroj la lingvistoj de la asocio kolektis la internaciajn vortojn kaj ordigis ilin, klopodante konservi la plej internaciajn ortografion kaj afiksaron, por ke la rezulta lingvo aspektu unuavide kiel lingvo natura. Ĉar la sama internacia vorto havas en diversaj lingvoj diferencajn formojn /informace - informacia - informacion, informazione, informatio, information/, necesis unu formon elekti /information/ kaj apliki ĝin ĉe ĉiuj samspecaj vortoj /nation, application, assimilation ktp./. Ofte devis resti malregulaĵoj ĉe derivaĵoj /reducer - reduction, distraher - distraction, responder - responsa/, la afiksoj ne havas precizan signifon. La litero C estas antau e, i, y legata kiel c /Cicero, civil, Cyprus/, en la aliaj vortoj kiel k /contra, electric, cuprum, cosinus, calcium, public, publicista, critica, criticismo/. Simile -ti- antau vokaloj estas legata -ci- /nation, situation, action/ kaj -s- inter vokaloj kiel -z- /rosa, naso = rozo, nazo/, alie kiel -s- /super, sub/. La literon -j- oni legas -ĵ- /pyjama, jornal, jargon/ kaj la sufikson -age kiel -aĝe /garage, etage/. La akcento troviĝas plejofte antau la lasta konsonanto /motor, libro, scribér, maĉstro/, kelkaj sufiksoj estas tradicie senakcentaj /cantáb-ile, nom-ine, témp-ore, Afr-ica, mús-ica/. La difina artikolo estas LE, la nedifina UN. La substantivoj havas en la singularo diversajn finaĵojn /nation, pede, libro, profesor, seniora/, en la pluralo ili akceptas -s, -es /nationes, pedes, libros, profesores, senioras/. La adjektivoj estas sensangaj/nove libro - nove libros/, plej ofte finiĝas per -e /forte, grande/ au per konsonanto /bon, clar, rar, san/. La adverboj akceptas la sufikson -mente /raramente, regularmente/ au finiĝas per -o /bravo, troppo, presto, subito, certo, quando/. La personaĵaj pronomoj estas: io - mi, tu - ci, ille - li, illa - ŝi, illo - ĝi, nos - ni, vos - vi, illos, illas, illos - ili. En akuzativo ili havas formojn "me, te, le, la, lo, nos, vos, les, las, los." Krome ekzistas senpersona pronomo /il pluve - pluvas/ kaj nedifina persona pronomo /on dice - oni diras/. La posedaj pronomoj estas neregulaj /mie - mia, tue - cia, sue - lia, ŝia, ĝia, nostre - nia, vostre - via, lore - ilia/ kaj antau la substantivoj kelkaj perdas -e /mi can - mia hundo, tu libro - cia libro, su matre - lia patrino, lor auto - ilia auto, nostre parentes - niaj gepatroj, vostre libros - viaj libroj/. La komparacio okazas per la vortoj "plus, le plus, minus, le minus" /plus interessante - pli interesa, le plus interessante - la plej interesa, minus interessante - malpli interesa, le minus interessante - la malplej interesa/. La verboj similas al tiuj de Occidental /amar, vider, finir/. Foriginte -r oni ricevas la volitivon /ama,

vide, fini - amu, vidu, finu/ kaj aldoninte al la volitivo la subjekton, oni formas la prezencon /matre ama - patrino amas, io vide - mi vidas, nos fini - ni finas/. La preterito akceptas -va /io amava, videva, finiva - mi amis, vidis, finis/, la futuro -ra /ille amara, videra, finira - li amos, vidos, finos/, la kondicionalo -rea /nos amarea, viderea, finirea - ni amus, vidus, finus/. La participoj havas formojn "amante, vidente, finiente, amate, vidite, finite" kaj havas ankaŭ signifon de gerundio kaj substantivo /vidente = vidanta, vidante, vidanto/. Simile kiel en Occidental estas uzataj ankaŭ helpvortoj haber /havi/ kaj esser/esti/, kiuj krom la regulaj formoj /io habe, io esse/ havas ankaŭ formojn neregulajn, mallongajn /io ha - mi havas, io es - mi estas, illes son - ili estas/. La verbo esser havas neregulan volitivon /sia - estu/ kaj aliaj formoj ekzistas en du versioj /nos esseva = nos era - ni estis, io essera = io sera - mi estos, tu esserea = tu serea - ci estus/. La mallongigitaj formoj estas uzataj ĉe kompleksaj tempoj /tu ha perditte - ci perdis, ci estas perdinta, ci havas perditte; tu haveva perditte - ci estis perdinta; illo esseva pagate = illo era pagate - ĝi estis pagita/. La negacio estas ĉiam nur unu kiel en Esperanto: Io non era ibi. Mi ne estis tie. Io nunquam era ibi. Mi neniam estis tie. Io ha nihil dicite a vos. Mi nenion diris al vi. No, io non catara. Ne, mi ne kantos. - Ekzistas ankaŭ la tiel nomata proksima futuro /io va cantar - mi tuj kantos, mi iras kanti/. La demando uzas au inversion au la vorteton esque = ĉu: Ĉu vi scias? - Sape tu? Esque tu sape?

Interesaj estas ankaŭ la numeraloj: zero, un, duo, tres, quatro, cinque, sex, septe, octo, novem, dece, dece-un, dece-duo, dece-tres ktp.; 20 vinti, 25 vinti-cinque, 30 trenta, 40 quaranta, 50 cinquanta, 60 sextanta, 70 septanta, 80 octanta, 90 novanta, 100 cento, 200 duo centos, 1000 mille, million, milliardo; 1979 mille novem centos septanta novem. La ordaj numeraloj estas neregulaj: prime, secunde, tertie, quarte, quinte, sexte, septime, octave, none, decime, dece-prime, dece-secunde, vintesimo, trentesimo ... centesimo, millesimo, millionesimo. Kaj rigardu la frakciojn: un medietate /un medie hora - duonhoro/, un tertio, duo tertios, un quarto, tres quartos, duo quintos, 13/20 dece-tres vintimos, 7/100 septe centesimos, 4/1000 quatro millesimos.

Ankoraŭ ni rigardu kelkajn derivaĵojn: juvene - juna, juveno - junulo, juvena - junulino, juventute - junularo, juneco; juvenil - junulara, juneca; vetule - maljuna, vetulo - maljunulo, vetula - maljunulino, vetulessa - maljuneco; patre - patro, paterne - patra, paternitate - patreco, patraŝtro - duonpatro, patrino - baptopatro; matre - patrino, materne - patrina, maternitate - patrineco, matraŝtra - duonpatrino, matrino - baptopatrino; avo = granpatre - avo, ava = granmatre - avino; fratre - frato, soror - fratino, filio - filo, filia - filino.

Interlingua nuntempe estas la dua plej sukcesa internacia lingvo post Esperanto. Ambau lingvoj estas reprezentantoj de diferencaj lingvistikaj konceptoj. Esperanto aplikas la principon "parolu au skribu por esprimi, ne por imponi", tial Zamenhof unue ellaboris gramatikan sistemon, kiu ebligas ĉiun vorton plene eluzi helpe de derivado. Ĉiu radiko eniranta en Esperanton devas adaptiĝi al tiu sistemo. La aŭtoroj de Interlingua male kolektis unue la internaci-

ajn vortojn, ellaboris la internacian vortaron kaj al ĝi ili adaptis la gramatikan sistemon. La ĉefa signifo de IALA estas en tio, ke ĝi ellaboris la interlingvistikon kiel teorion, kiel specialan disciplinon de la ĝenerala lingvoscienco. Tiamaniere ĝi ebligis sciencon esploradon de la ideo pri la internacia lingvo.


Fine ni rigardu la komencon de la fama fabelo de Andersen, kiun ni jam vidis en Ido, nun en Interlingua:

Le perseverante Soldato de Plumbo. Il habeva olim vinti-cinque soldatos de plumbo, totos era fratres proque facite ex le mesme ancian colear de peltro. Le fusil illes portava al spatula, illes reguardava tote directe ante se, rubie e blau era le uniforme.

Kaj nun en Esperanto:

La brava stansoldato. Estis iam dudek kvin stansoldatoj, ili ĉiuj estis fratoj, ĉar ili devenis de malnova stankulero. La pafilon ili tenis per la brako, la vizaĝo rigardis rekte antaŭen; ruĝa kaj blua, vere bela estis la uniformo.

(Miroslav Malovec)



16-jara metia lernanto interesigas pri geografio, muziko (rock), astronomio kaj kolektas insignojn. Volas korespondi tutmonde. Adreso: Roman Heřman, Pod koupalištěm 730, CS-293 06 Mladá Boleslav, Ĉeĥoslovakio

Ĉefa esperantisto volas korespondi kun ĉinaj kaj vjetnamaj esperantistoj. Adreso: František Zöld, CS-341 71 Malý Bor 112, Ĉeĥoslovakio

40-jara flegistino deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj. Kolektas bildkartojn kaj postmarkojn. Adreso: Blanka Faltýnková, Školská ul. 321, CS-503 02 Předměstí n. Lab., Ĉeĥoslov.

26-jara inĝeniero pri radioelektroniko interesigas pri historio, vojaĝoj, sporto kaj moderna muziko. Li parolas bone la anglan, rusan, Esperantan kaj iomete

germanan lingvojn. Kolektas bildkartojn, turismajn prospektojn, insignojn kaj monerojn. Adreso: Bulgario, Sofia 1680, Krasno selo bl. 215, vh. E, et. 2, ap.96 Valentin Gencev Gencev

21-jara oficisto interesigas pri filatelo kaj historio, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Bogdan Grajek, Lubcz 24, PL 88-421 Lubcz, Pollando

29-jara flegistino interesigas pri turismo. Adreso: Ewa Zarowska, str. Widok 2, 67-115 Bytom Odrzański, Pollando

34-jara kudristino kolektas bildkartojn, postmarkojn, interesigas pri turismo, satas filmon kaj dancon. Adreso: Barbara Radlak, 59-615 Nowogrodziec, ul. Strzelecka 1/15, woj. Jelenia Góra, Pollando

25-jara polo interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Grzegorz Boberek, 95-035 Ozorków, str. Gebicka 51, Pollando

Pri vojaĝoj, turismo, filmo, teatro, loĝado en Pollando kun 18- ĝis 40-jaraj sinjoroj kaj sinjorinoj el la tuta mondo volas korespondi fraŭlo Mario Zonik, str. Chłodna 31, cambro 21 OCHMS - AUGUSTINUM, Varsovio, Pollando.

49-jara labgrantino en scienca biblioteko interesigas pri turismo, historiaj monumentoj, muzeoj, kolektas bildkartojn. Adreso: Maria Krysinaka, PL-31-853 Krakow XX-jaro PRL 19/21, Pollando.

15-jara lernantino interesigas pri sporto, moderna muziko, literaturo, iam kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Małgorzata Czajczyńska, Józefów 43, 63-313 Chocz, woj. Kaliskie, Pollando

30-jara muzikisto interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro. Adreso: Krzysztof Gburczyk, str. Południowa 5, 20-482 Lublin, Pollando

36-jara inĝeniero interesigas pri turismo, automobilo, kolektas bildkartojn. Adreso: Kazimierz Ziąja, 32-300 Olkusz, str. Skalska 14/22, Pollando

Du polaj studentinoj 22-jaraj interesigas pri turismo, literaturo, filmo, muziko, teatro, la vivo de junaj homoj kaj iliaj tagaj problemoj, plej multe ili satas vojaĝi. Ili studas polan filologion en Gdaneko. Adreso: Beata Traczyk, ul. Obr. Westerplatte 3/4, 80-317 Gdańsk, Pollando

Bożena Traczyk, ul. Korczaka 3/13, 80-540 Susz, Pollando

31-jara fraŭlino laboras en hospitalo, interesigas pri muziko, filmo, sporto, turismo kaj literaturo, parolas ruse, germane kaj Esperante. Adreso: Halina Maj, 42-140 Panki, Jaciska 45, Pollando

26-jara flegisto interesigas pri sporto, filozofio, medicino kaj matematiko. Adr.: Sławomir Dudzik, Goniwilk 1, 08-430 Żelechów, Pollando

23-jara studentino interesigas pri turismo, literaturo, arto, filmo, si satas kanti, ludi gitaron. Adreso: Barbara Walaszek, Ul. Kazimierza Wielkiego 28/5, 43-300 Bielsko-Biała, Pollando

19-jara komencanto dez. kor. tutmonde pri komputiloj, bicikloturistado, elektromiko, modelfervojoj k.a., kol. bk, pm,

precipe pri temo fervojoj ktp. Adreso: Wico Kirsch, Bedheimer Str. 89, Simmershausen, 6111 DDR

22-jara komencanto deziras korespondi pri Esperanto, turismo, sporto (ĉevaloj, sako) kaj kulturo. Adreso: Detlef Groth, 1092 Berlin, Werneuchener Str. 12 A, GDR

25j., dez. kor. tutmonde, p.ĉ.t. Katrin Malich, OT Gruben 49, 8251 Scharfenberg, GDR

29-jara sinjorino dez. kor. pri muziko, vojaĝoj, bildkartoj, ludas orgenon. Adr. Verena Gödey, Str.des 18. Oktober 6A/64 DDR-7010 Leipzig

43-jara min-inĝeniero korespondas pri psikohigieno, joko, korpokulturo. Adreso: SU-678626 Jakutskaja ASSR, Ustj-Majskij r-on, g. Solneĉnij, ul. Stroitelej, 13/1, kv. 4 Nikitin Vladimir Petroviĉ

23-jara edukistino en infangardeno interesigas pri naturo, vojaĝo, pentrarto, historio, humoro, satiro, memfaritaĵoj, okupigas per trikado, kroĉetado, kudrado, manlaboro, kolektas bildkartojn, postmarkojn, kalendaretojn, kopibildetojn, alumetskatolojn. Adreso: Tatjana Džurilo, Abon. ja. 377, Krasnodar 350C40 Sovetunio

27-jara inĝeniero ktm, inters. pm., bk., E-ajojn, pri div. temoj, komputado. Adreso: Oleg Streleckij, SU-220050, Minsk 50, ul. Mjasnikova 78, kv. 5

16-jara lernanto serĉas korespondgeamikojn tutmonde. Skribu al: Malcev Gleb, Proletarskaja, 71. Ĉjurupinsk 326520, USSR

32-jara filologo serĉas amikon aŭ amikino por korespondi pri lingvaj demandoj kaj aliaj temoj. Eduardas Malevičius, Raguvos 19 - 11, Kaunas 233000, Lit.SSR

22-jara junulino deziras korespondi kun geamikoj. Ruta Tonkunaitė, Automobilistu 11-37, Kaunas 233043, Lit. SSR

Kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj volus korespondi Hamid Boutowla, BP 119 Berriane 47 100 W. Ghardata, Algerie

(fino de sur pg. 23)

bonvenigitaj kaj aktive partoprenis ilian kluban programon. Žilinaĵoj visitis Vítkovioanojn maje; ili prezentis sian programon. Post la programoj ĉiuj amike babilis en la klubejo. Plua komuna afero estis en junio turisma marŝo sur monton Čantoryje en Beskydy. (Zdeněk Šlosársek)

NEVIDANTOJ En sia kunveno, okazinta la 14-an de majo 1988, aprobis la komitato de Sekcio de nevidantoj tri siajn signifajn aranĝojn: seminarion por progresintoj (18. 6.), seminarion por komencantoj (24. 9. 1988) kaj la tutrespublikan renkontigon de nevidanta esperantistoj (10. 9. 1988). Kiel gastoj partoprenis la kunvenon ankaŭ du reprezentantoj de Sekcio de invalidoj, ges-anoj Malínská kaj Vaněček. Oni informigis reciproke pri sia agado kaj laborperspektivoj. Oni trovis, ke malgraŭ la diferencoj, kausitaj per tio, ke ĉiu sekcio laboras kun alimaniere handikapitaj personoj, oni havas multajn eblecojn de bona kunlaboro. Ili do interkonsentis, ke

1. ili intersangados artikolojn kaj aliajn informojn pri siaj sekcioj, kaj
2. ili invitos sin reciproke al siaj aranĝoj.

La ambaŭ sekcioj esperas, ke tiu ĉi promesplena komenco baldaŭ disvolviĝos al riĉa kunlaboro. (Jiří Vychodil)

el la sekretariejo

Internacia seminario **TERMINOLOGIO KAJ NORMIGO** organizata de ĈEA kunlaboro kun TSC, okazos de la 26-a ĝis la 28-a de januaro 1989 por 30 invititaj personecoj de ĉeĥoslovaka terminologio kaj normigaj institucioj.

Upozornujeme, že výpůjční řád magnetofonové služby ČES byl uveřejněn v 2. letošním čísle Starta (na str. 27). Na protější straně uveřejňujeme první část seznamu mg. nahrávek, které si můžete nechat nahrát. Další části seznamu uveřejníme v příštích číslech.

NABÍZÍME: Prof. Jan Filip a Karel Filip: Velký slovník esperantako-český, 1. a 2.díl celkem za 65,- Kčs.
K dostání na sekretariátě ČES.

Připravujeme zájezd na 74. světový sjezd do Brightonu ve Velké Británii. Očekáváme, že nebude o mnoho dražší, než zájezd na letošní světový sjezd do Rotterdamu. Bližší informace budou v příštím čísle. Zatím začněte spočít.

Nesapomeněte si včas objednat esperantské časopisy ze socialistických zemí u Poštovní novinové služby. Adresa: PNS-Ústřední expedice a dovoz tisku, Dlouhá tř. 12, 110 01 Praha 1. PNS dodává časopisy na fakturu, kterou je nutno zaplatit předem. Na dobírku se zahraniční časopisy nedodávají.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas OKP-6 Liberec. Transdonita al pressajo 1988-07-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 MLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantického svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanousek (grafická úprava), M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Povolen odbozem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 31.7.1988. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

KAZETY VÝPŮJČNÍ MAGNETOFONOVÉ SLUŽBY ČES

- | | | |
|----|--|-----|
| 1. | ESPERANTO PROGRAMITA | 60' |
| | Parolas: U. Lindner, N. Taucar, W. Reinwald, K. Glumac kaj H. Behrmann | |
| 2. | ESPERANTO JUNULKURSO Francujo | 60' |
| 3. | MONOLOGO KAJ KANTOJ | |
| | A: La tri sonoriloj (kant. Olivier Tzaut - Svislando) | 30' |
| | Mariston logas vasta maro (kant. Frans Jagher, Usono kaj akompanas sin per gitaro) | |
| | Bovoĉaro - " - | |
| | Jukajdi, jukajda - " - | |
| | Lorelaj - " - | |
| | Fluanta tajdo - " - | |
| | Pasintaj tagoj - " - | |
| | Ĉiu, ĉiu - " - | |
| | Lulkanto - " - | |
| | Kara Kentuki-lando - " - | |
| | B: Mia eksterlanda vojaĝo (monologas Duncan Char'ers, Usono) | 30' |
| | La pompiginta ringeto (F. Jagher, Usono) | |
| | Funga kanto - " - | |
| | Rapide, knabo (kant. M. Fasani, Italio) | |
| | Venos libero - " - | |
| | Birdeca birdo - " - | |
| | Ni amas la tutan mondon - " - | |
| | Orfino - " - | |
| | Eliras la Eŭska al suno - " - | |
| 4. | VYSLANCI NAŠÍ KULTURY (str. A) - el radio-elsendo | |
| | Parolas Vl. Novobilský, J. Kořínek kaj V. Mohaupt | 30' |
| | B: Ol duono (kant. Suzana Kastelviva + M. Fasani, It.) | 30' |
| | La viroj - " - | |
| | Monahino - " - | |
| | Balado pri Ana Brenan - " - | |
| | Kvankam mi virinas - " - | |
| | Lulas panjo - " - | |
| | Mariŝa - " - | |
| | Ni jam enuis - " - | |
| | En ĉi-arbaro - " - | |
| 5. | VIVO DE J. KOŘÍNEK | |
| | A: Interparolo de Vl. Novobilský kun Jiří Kořínek | 45' |
| | B: Verko de Jiří Kořínek (poemoj, kantoj, arioj k.s.) | 45' |
| 6. | INTERNACIA LINGVA SITUACIO kaj eblecoj de la raciigo | |
| | Prelego de E. A. Bokarev, Sovetunio, el jaro 1967 | 60' |
| 7. | KONFRONTA KOMPARO de Esperanto al la etnolingvoj | |
| | Prelego de D. Blanke, GDR | 60' |
| 8. | HISTORIO DE C. E. D. (Centro de esploro kaj dokumentado) | |
| | Prelego de I. Lapenna el jaro 1973 | 60' |
| 9. | A. Seghert: LA EKSURSO DE MORTINTAJ KNABINOJ | |
| | Monologas Eva Seemannová | 55' |
| | BABLJ JAŖ | |
| | Poemo de J. Jevtusenko, recitas J. Balbin, Usono | 5' |

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979